# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

12
1975






Jango-danca trupo venis al Zaŭjuan (ĉinstila pentraĵo)



Prezidanto Maŭ en norda Ŝenŝi

# Ĉiam brilas la spirito de Jan-an




Transirinte sennombrajn montojn kaj riverojn, venkinte naturajn obstaklojn unu post alia kaj trarompinte multajn blokadliniojn de la malamiko en la Longa Marŝo, la Centra Ruĝa Armeo sub la persona gvido de Prezidanto Maŭ sukcese atingis nordan Ŝenhi en oktobro de 1935 kaj venke kuniĝis ĉe Vukiĝen kun la 15-a Armegrupo de la Ruĝa Armeo kune formita de la Ruĝa Armeo de norda Ŝenhi kaj la 25-a Korpuso de la Ruĝa Armeo veninta de la Hubej-Henan-Anhuj-a Bazo.

En novembro de 1935, la trupoj de la Ruĝa Armeo akiris grandan venkon en la batalo ĉe Ĝiluoĝen sub la komando de Prezidanto Maŭ kaj per tio metis la fundamenton por instali la ĉefstabejon de la Partio en Nordokcidentan Ĉinion por gvidi la tutlandan movadon kontraŭ la japana agreso. La bildo montras siatempan stabejon, kie Prezidanto Maŭ komandis la batalon.




En decembro de 1935, Prezidanto Maŭ prezidis la kunvenon de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio en Vajaŭbu.







Zaŭjuan, kie loĝis Prezidanto Maŭ dum sia restado en Jan-an






En oktobro, ankaŭ la Dua-fonta Armeo kaj la Kvara-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo atingis nordan Ŝenhi kaj venke kuniĝis kun la Unua-fronta Armeo kaj la 15-a Armegrupo de la Ruĝa Armeo en Hujning kaj malfermiĝis nova revolucia situacio.





Angulo de Jan-an hodiaŭ




Nova industria kvartalo de Jan-an





La Universala Maŝinfabriko de Jan-an

Energia akvoutiliga konstruado por pliprodukto.

*(Dekstre malsupre)*









Tutlanda labora heroo Haŭ Ŝucaj, eksruĝarmeano instruas produktajn sciojn al malmobilizita soldato.

# La grandioza Longa Marŝo

EN oktobro de tiu ĉi jaro estis la 40-a datreveno de la venko de la Longa Marŝo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo — la rudimento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ekde aŭtuno de 1934, la Centra Ruĝa Armeo, t.e. la Unua-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo, marŝis el la revolucia bazo en Gianghi, zigzage pasis tra 11 provincoj, venke atingis Vukiĝen de norda Ŝenhi je la 19-a de oktobro de 1935 post marŝo de 25,000 lioj (unu lio = duonkilometro) kaj kuniĝis kun la Ruĝa Armeo de Norda Ŝenhi kaj la 25-a Korpuso de la Ruĝa Armeo kiu alvenis al tiu loko pli frue. En oktobro de 1936, ankaŭ la Dua- kaj Kvara-frontaj Armeoj de la Ruĝa Armeo venke atingis nordan Ŝenhi. Tiu senprecedenca strategia transmoviĝo estas la Longa Marŝo fame konata tra la mondo.

En aŭtuno de 1927, Prezidanto Maŭ persone fondis la unuan trupunuon de la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo kaj la revolucian bazon de Ginggang-montaro. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la bazo disvolviĝis senĉese kaj la Ruĝa Armeo kreskis kun ĉiu tago. Pluraj "ĉirkaŭekstermoj" grandskale entreprenitaj de la kuomintangaj reakciuloj estis sinsekve frakasitaj kaj aperis bonega revolucia situacio. Sed Vang Ming kaj aliaj "maldekstraj" oportunistoj, karakterizitaj ĉefe per dogmismo, ekskluzivis Prezidanton Maŭ el la gvida rolo en la Partio kaj la Ruĝa Armeo, komplete neis la ĝustecon de la marksismaj-leninismaj politika kaj milita linioj de Prezidanto Maŭ, por praktiki "maldekstran" oportunisman linion kaj per tio alportis ekstreme seriozan domaĝon al la Partio kaj la Ruĝa Armeo kaj malebligis la disrompon de la kvina "ĉirkaŭekstermo" de la malamiko, tiel ke la Ruĝa Armeo estis devigita transmoviĝi kaj fari la Longan Marŝon.

En aŭgusto de 1934, la Sesa Armegrupo de la Ruĝa Armeo komencis marŝi de la revolucia bazo en la Hunan-Gianghi-a Limregiono al la orienta parto de Gujĝoŭ, kuniĝis kun la Dua Armegrupo de la Ruĝa Armeo kaj formis kun ĝi la Dua-frontan Armeon de la Ruĝa Armeo. En oktobro de la sama jaro, la Unua-fronta Armeo forlasis la centran revolucian bazon por komenci la Longan Marŝon. Post trarompo de kvar blokadlinioj de la malamiko unu post alia, la Centra Ruĝa Armeo jam suferis tre grandan perdon. En tiaj cirkonstancoj, la "maldekstraj" oportunistoj ankoraŭ insistis por daŭre militiri al okcidenta Hunan por kuniĝi kun la Dua kaj Sesa Armegrupoj de la Ruĝa Armeo, malgraŭ la fakto ke la malamiko jam postenigis multajn trupojn sur la vojoj tramarŝotaj. La Ruĝa Armeo alfrontis danĝeron de kompleta pereo. Dank' al tio, ke Prezidanto Maŭ ĝustatempe elmetis la saĝan ideon forlasi la planon de kuniĝo kun la Dua kaj Sesa Arme-

grupoj de la Ruĝa Armeo kaj turni la direkton al Gujĝoŭ, kie la malamikaj trupoj estis malfortaj, la Ruĝa Armeo konkeris la urbon Zunji en januaro de 1935 surprize por la malamiko.

La ekstreme granda perdo alportita de la "maldekstra" oportunisma linio de Vang Ming al la Partio kaj la Ruĝa Armeo kaŭzis ĉiam pli da dubo kaj malkontentiĝo al la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj, ke ili ĉiuj deziregis la revenon de Prezidanto Maŭ al la gvida posteno. En januaro de 1935, la centralo de la Partio kunvokis plivastigitan konferencon de la Politika Buroo en Zunji de Gujĝoŭ, en kiu oni kritikis la erarojn de la linio de Vang Ming en militaj aferoj, likvidis la regadon de la linio de Vang Ming en la centralo de la Partio, starigis la gvidantecon de Prezidanto Maŭ en la tuta partio kaj la tuta armeo, remetis la linion de la Partio sur la ĝustan trakon de Marksismo, kaj per tio la Partio kaj la Ruĝa Armeo estis savitaj en la kriza momento de la revolucio. Tio estis granda turnopunkto en la historioj de la Partio, la Ruĝa Armeo kaj la revolucio de Ĉinio.


Post la Konferenco de Zunji, Prezidanto Maŭ decidis militiri norden por rezisti kontraŭ la agreso de Japanio. Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ la Centra Ruĝa Armeo alprenis flekseblajn strategion kaj taktikojn, sagace movadis la malamikojn kaj rapide reakiris la iniciativon en strategio. En la lasta tagdeko de januaro de 1935, la Ruĝa Armeo unuafoje transpasis la riveron Ĉiŝuj en la sudan parton de Siĉuan por iri norden trans Jangzi. Ĉiang Kajŝek lokis multajn trupojn ĉe la limo inter Siĉuan kaj Gujĝoŭ kaj plifortigis la gardon de Jangzi por bari la vojon al la Ruĝa Armeo. Prezidanto Maŭ tuj decideme direktis la trupojn orienten, kaj tiuj duafoje transpasis Ĉiŝuj en la meza tagdeko de februaro kaj refoje okupis Zunji eksterminte kaj frakasinte du diviziojn kaj ok regimentojn de la malamiko en unu bato. Por plie movadi la malamikajn trupojn, la Ruĝa Armeo triafoje transpasis Ĉiŝuj en la meza tagdeko de marto kaj refoje venis al la suda parto de Siĉuan. Tiam Ĉiang Kajŝek konjektis, ke la Ruĝa Armeo denove intencas transpasi Jangzi, kaj haste lokis multajn trupojn ĉe la limo de Siĉuan, Gujĝoŭ kaj Junnan. Kiam malamikaj trupoj estis kolektitaj, Prezidanto Maŭ subite reiris en Gujĝoŭ kun la Ruĝa Armeo, kvarafoje transpasis Ĉiŝuj en la lasta tagdeko de marto, tuj poste transpasis Vugiang-riveron suden, ŝajnigante sin atakonta Gujjang, la ĉefurbon de Gujĝoŭ kaj per tio devigis Ĉiang Kajŝek movi trupojn de Junnan al Gujĝoŭ. Profitante tiun ŝancon, la Ruĝa Armeo rapidis rekte en Junnan kaj en la unua tagdeko de majo sagace transpasis Ginŝa-riveron. Nur tiam la Centra Ruĝa Armeo sin liberigis de la persekutado kaj obstrukcado de la malamikaj fortoj el centmiloj da soldatoj kaj akiris plenan strategian iniciativon en la Longa Marŝo. La kvarfoja transpaso de Ĉiŝuj estas granda venko kun decida signifo por strategia transmoviĝo de la Centra Ruĝa Armeo kaj plene manifestis la brilecon de la militaj pensoj kaj milita arto de Prezidanto Maŭ.

En la procedo de la kvarfoja transpaso de Ĉiŝuj, Lin Biaŭ kaj Peng Dehuaj oponis en koluzio kontraŭ la penso de movada milito de Prezidanto Maŭ kaj pro tio estis severe kritikitaj de la lasta.

Post transpaso de Ginŝa-rivero, dank' al rezoluta praktiko de la politiko de Prezidanto Maŭ koncerne al nacimalplimultoj la Ruĝa Armeo ricevis subtenon kaj helpon de jipopolo kaj glate trapasis la regionon de Daliang-montaro. Tuj sekve ĝi perforte transpasis Dadu-riveron, fulmrapide konkeris la ferĉenan Luding-ponton, transgrimpis la tutjare neĝkovratan Giagin-monton kaj kuniĝis kun la Kvara-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo en Maŭgong de Siĉuan-provinco. En la lasta tagdeko de junio, la centralo de la Partio kunvokis kunvenon de la Politika Buroo en Lianghekoŭ, en kiu Prezidanto Maŭ ĝuste analizis la en- kaj eksterlandan situacion kaj decidis plue marŝi norden por

gvidi la tutlandan naciliberigan movadon de rezistado kontraŭ la japana agreso. Sed Ĝang Guotaŭ, kiu uzurpis la gvidantecon de la Kvara-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo kaj estis pesimisma pri la estonteco de la ĉina revolucio, oponis kontraŭ marŝado al la nordo, proponante fuĝi suden. Prezidanto Maŭ kaj la centralo de la Partio kritikis lian eraran linion. En julio, la Ruĝa Armeo transpasis plurajn neĝkovritajn montegojn kaj atingis Maŭergaj. En aŭgusto, la centralo de la Partio kunvokis tie konferencon de la Politika Buroo. Post tiu konferenco, la Unua- kaj Kvara-frontaj Armeoj de la Ruĝa Armeo marŝis norden respektive en du paralelaj kolonoj. La trupoj de la dekstra kolono sub la gvido de Prezidanto Maŭ venkis froston kaj malsaton, trapasis la senhoman marĉan herbejon kaj ekstermis unu divizion de la malamiko en Bahi-regiono de Siĉuan. Kiam la trupoj de la maldekstra kolono atingis la lokon Aba, Ĝang Guotaŭ malkaŝe suriris la vojon de splitigo de la Partio kaj la Ruĝa Armeo, trompis kaj devigis la Kvara-frontan Armeon de la Ruĝa Armeo fuĝi al la limregiono de Siĉuan kaj Hikang kaj eĉ starigis alian "centran organon de la Partio". Prezidanto Maŭ kaj la centralo de la Partio faris rezolutan batalon kontraŭ la intrigo de Ĝang Guotaŭ, plue kondukis la ĉefforton de la Centra Unua-fronta Armeo norden laŭ la origina plano, trarompis la pasejon Lazikoŭ, transgrimpis la monton Liupan, atingis Vukiĝen de norda Ŝenhi je la 19-a de oktobro de 1935 kaj kuniĝis kun la Ruĝa Armeo de norda Ŝenhi kaj la 25-a Korpuso de la Ruĝa Armeo.

Mapo pri la Longa Marŝo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo



Kaj post tio, sub la persona komando de Prezidanto Maŭ la Ruĝa Armeo gajnis la batalon ĉe Ĝiluoĝen kun rezulto de ekstermo de unu divizio kaj unu regimento de la malamiko kaj per tio **metis fundamenton por la tasko de la Centra Komitato de la Partio loki la tutlandan ĉefstabejon de la revolucio en nordokcidenta Ĉinio.**

La Dua-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo rezolute observis la linion de Prezidanto Maŭ marŝi norden por rezisti kontraŭ la japana agreso kaj ekiris de la Hunan-Hubej-Siĉuan-Gujĝoŭ-a Bazo en novembro de 1935 kaj kuniĝis en Ganzi de Siĉuan kun la Kvara-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo en junio de 1936. Direktate de la revolucia linio de Prezidano Maŭ, per la rezoluta batalado de la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj de la Kvara-fronta Armeo sub helpado de la Dua-fronta Armeo, la dekstra fuĝismo kaj splitismo de Ĝang Guotaŭ estis venkitaj kaj la Dua- kaj Kvara-frontaj Armeoj fine venke atingis Hujning de Gansu en oktobro de 1936 kaj kuniĝis kun la Unua-fronta Armeo.

La venko de la Longa Marŝo estas venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ĝi havas grandan strategian kaj profundan historian signifon. Prezidanto Maŭ jene diris pri ĝi: **"La Longa Marŝo estas la unuafoja en la kronikoj de historio, ĝi estas manifesto, ĝi estas propagandistaro, ĝi estas semmaŝino." "La Longa Marŝo finiĝis per nia venko kaj malvenko de la malamiko." "Nova situacio komenciĝis tuj post kiam la Longa Marŝo finiĝis."** Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, la Partio, la armeo kaj la popolo de Ĉinio praktikis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, poste venkis ripetade ĝenojn kaj subfosojn de oportunismaj linioj kaj la en- kaj eksterlandajn potencajn malamikojn, gajnis la Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la Liberigan Militon, fondis la Ĉinan Popolan Respublikon de diktaturo de la proletaro kaj brave marŝas antaŭen per grandaj paŝoj sur la vojo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

**JU HINĴONG:**

# Grandioza s... de unuiĝo...

LA 12-an de septembro, 1975 ruĝaj flagoj flirtis sur la Pekina Laborista Stadiono. Solene malfermiĝis tie la Tria Sporta Konkurso de la Ĉina Popola Respubliko.

En la malferma soleno prezentiĝis grandioza amasa gimnastiko «Ruĝa Flago». Tiu prezentado estis farita de pli ol 23,000 gejunuloj, geknaboj, sportistoj kaj soldatoj kaj daŭris pli ol 80 minutojn. Per gigantaj belaj bildoj kaj figuroj formitaj de la moviĝantaj homoj, la ekzercado vivece prezentis la korvibrigan scenon ke la diversnacieca popolo de nia lando batalas en solidareco laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj socialismo ĉie triumfas en Ĉinio. Je la fino de tiu prezentado, infanoj en festaj kostumoj ellasis milojn da koloraj balonoj kaj la inaŭguro finiĝis en jubilo de la dekmiloj da ĉeestantoj.

Tiun ĉi grandiozan sportan kunvenon ĉeestis pli ol dek mil personoj inkluzive de sportistoj, sportaj laborantoj kaj reprezentantoj de avangardaj bazaj unuoj de sporta aktivado de ĉiuj provincoj (inkluzive de Tajvan), urboj, aŭtonomaj regionoj kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ili apartenas al 31 naciecoj. Kaj ĝin ĉeestis laŭ invito ankaŭ gastoj el 19 landoj kaj regionoj kaj delegacioj de sportaj rondoj de Hongkongo kaj Aŭmen.

Post 17-taga streĉa kaj arda konkursado, la tutlanda sporta konkurso venke finiĝis je la 28-a de septembro.

# ...ortkunveno kaj venko



*Pafistino Gin Donghiang, rompinto de monda rekordo*

Tiu ĉi konkursado atingis nemalmultajn sukcesojn en sporta tekniko. Oni rompis en ĝi tri mondajn rekordojn de pafado, atingis du mondajn rekordojn de pafado kaj arkopafado, rompis 1 atletikan rekordon de la Azia Sporta Kunveno, atingis pezlevan rekordon de la Azia Sporta Kunveno kaj starigis 62 novajn landajn rekordojn kaj 64 landajn rekordojn de geknaboj. La teknika nivelo de la plejparto de niaj sportaj disciplinoj altiĝis je variaj gradoj, kaj precipe rimarkinde la virinaj disciplinoj. En la konkurso de virina rapida kaj malrapida 60-pafa pafado per pistolo, la ĈPLA-aj sportistinoj Dong Hiangji, Li Jamin kaj Du Ningŝeng rompis la mondan grupan kaj individuan rekordojn de tiu disciplino starigitajn de sovetuniaj sportistinoj. Liaŭning-a sportistino Gin Donghiang rompis per 578 cirkloj la mondan rekordon de virina 3 × 20-pafa pafado per norma fusilo tenatan de jugoslava kaj sovetunia sportistinoj.

Aperis nombro da eminentaj debutantoj de naĝado. 14-jara sportistino Ĝaŭ Ging de Hejlonggiang-provinco gajnis la ĉampionecon de kvar disciplinoj de virina rapidnaĝo kaj rompis tri landajn rekordojn de plenaĝaj virinoj. Sportisto de la ŝanhaja teamo Tang Kjun rompis la landajn rekordojn de la 100-metra kaj 200-metra viraj dorsnaĝoj. La malfacilajn plonĝojn, kiujn nur malmultaj plonĝistoj povis fari en la Dua Sporta Konkurso en 1965, nun jam povas fari ĝenerale la ge-

*Varman gratulon al Dong Hiangji (dekstre fronte), Li Jamin (la dua de dekstre malantaŭe) kaj Du Ningŝeng (la unua de dekstre malantaŭe) pro ilia rompado de mondaj rekordoj*



plonĝistoj, kaj iuj el ili eĉ sukcesis fari ankoraŭ pli malfacilajn.

La teknika nivelo de multaj gimnastikaj teamoj altiĝis kaj aperis nombro da junaj gimnastoj kun bonkvalita korpo. 7 el la 8 gajnintoj de la ok unuaj lokoj en la virina kunmetita gimnastika konkurso havas malpli ol 17 jarojn, inter kiuj la pekina 13-jara gimnastino Liu Jagjun gajnis la ĉampionecon de la kunmetita konkurso kaj tiujn de tri pogimnastilaj konkursoj. Aperis nacistilaj modernaj gimnastikaj ekzercoj tre plaĉaj al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.


Originalaj teknikaj stiloj estas formiĝantaj en iuj sportaj branĉoj kaj ĉe iuj sportaj teamoj. Ekzemple la korbopilkaj teamoj de Hubej kaj aliaj lokoj persistas en la stilo de rapideco, precizeco kaj fleksebleco konforme al sia teamo kaj jam akiris ĝojindajn sukcesojn.

Rapide kreskas ankaŭ nacimalplimultaj sportistoj kaj sportaj teamoj de provincoj kaj regionoj ĉe la landlimoj, kaj aperis inter ili grupo da elstaraj sportistoj. Membro de la Gansu-a Bicikla Teamo Ju Janhiu gajnis la ĉampionecon de 30-kilometra virina biciklado sur ŝoseo. En pafkonkurso, tibeta sportistino Norco rompis unu landan rekordon. Hingiang-a ujgura sportistino Patigul gajnis la 5-an lokon de la kunmetita gimnastika konkurso de la virina A-grupo. Mongola knabino Luo Juhiu de Kinghaj-provinco rompis la rekordon de 1,500-metra knabina kuro.


Dum la sporta konkurso prezentiĝis ankaŭ nacimalplimultaj tradiciaj sportoj kiel ludado de trapezo kaj saltotabulo de koreoj, rajdado de mongoloj kaj luktado de nacimalplimultoj de Junnan-provinco, kaj krome prezentiĝis ankaŭ motorciklado, paraŝutado, aviadaj kaj navigaj modeloj, motorboatoj k.a. militaj sportaj aktivadoj. Infanoj de pekinaj infanĝardenoj prezentis por la konkurso kolorriĉajn infanajn sportajn ludojn.

Grava karakterizaĵo de tiu ĉi konkurso estas ke la sportistoj kaj sportaj laborantoj montris novajn penson kaj stilon. Sporta armeo armita per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj havanta tute novan spiriton jam formiĝis. Sportistoj metis la studon de teorio de la diktaturo de la proletaro en la unuan lokon kaj ĉiutage uzis certan tempon por studi teorion, eĉ en la periodo de streĉa konkursado kaj faris revolucian kritikon en ligo kun la aktualaĵoj sur la sporta fronto. Direktate de la principo "unue

*Prezentado de rajdarto fare de mongolaj sportistoj*




*Jen kvar sportistoj rompintaj la tutlandan rekordon de vira 5,000-metra kuro*




amikeco, due konkurso" la sportistoj kaj trejnistoj el diversaj lokoj kune sin ekzercis, diskutis ludarton, kaj spertaj veteranoj varme helpis debutantojn. En multaj streĉaj maĉoj de piedpilko, korbopilko kaj akvopilko la sportistoj preferis perdi poenton ol lasi rivalojn vundiĝi. En la 5,000-metra vira kuro, kompartiano Peng Hiangŝeng per sia plej granda rapideco kuris antaŭe sen konsidero pri sia persona intereso por stimuli la konkursantojn atingi bonan sukceson, kaj dank' al tio 4 el ili renovigis landajn rekordojn.

Por ke pli multaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj vidu sportajn konkursojn kaj prezentadojn, pli ol 280 el la pli ol 800 eroj konkursaj kaj prezentaj estis faritaj en fabrikoj, vilaĝoj, kazernoj, lernejoj k.a. bazaj unuoj en Pekino kaj ĝia ĉirkaŭurbo. La sportistoj kaj sportaj laborantoj rigardas servadon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiel sian gloran taskon. Ili faris sportajn prezentojn senkondiĉe kaj sen timo al malfaciloj. La findecida gimnastika konkurso de la grupo A estis farita sur eksterdoma sporta placo en antaŭurbo de Pekino kaj ventegis en tiu tago. Sed la sportistoj serioze faris ĉiun movon malgraŭ la varmega suno kaj sablovento kaj atingis grandajn sukcesojn. La naĝistoj de



*Antaŭ biciklado*





*Giang Huagen, kiu rompis landan rekordon de ŝira pezlevo de pezkategorio 52*

Hunan faris prezentadon de naĝarto kaj akvopilkado por armea trupo utiligante tagmezajn horojn. La akvo en la liberĉiela baseno estis malvarma, sed la sportistoj ĝoje diris, ke farante prezentadon por la karuloj de ĈPLA ili sentas varmon en la koro. Kaj la sportistoj kaj sportaj laborantoj ankaŭ partoprenis en laboro en fabrikoj kaj kamparo por lerni bonajn pensojn kaj kvaliton de popolamasoj kaj per tio ankoraŭ pli evidentigis la direkton de sportado servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Por tiu ĉi konkursado reprezentantoj de 300 avangardaj bazaj unuoj en sporta aktivado kaj pli ol 1,000 laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estis invititaj por partopreni en komentariado. Ili aktivadis ĉe la konkursejoj kaj faris komentariojn pri la pensoj, laborstiloj kaj teknikoj de la sportistoj, juĝistoj kaj trejnistoj en formo de kunsido, nigratabula gazeto aŭ persona interŝanĝo de opinioj. Por bone plenumi sian laboron, iuj el ili eĉ faris specialajn vizitojn al iuj teamoj. Ilia klopodado helpis la laboron de la konkurso.

Tiu ĉi konkurso estas ankaŭ revuo al la novaj fortoj de niaj sportaj rondoj. 83% el la sportistoj partoprenintaj en la konkurso estas debutantoj de malpli ol 22-jara aĝo, aperintaj post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio. La plejparto de tiuj kiuj rompis mondajn kaj landajn rekordojn estas geknaboj. Gin Donghian, kiu rompis la mondan rekordon de virina 3 × 20-pafa pafado per norma fusilo estas nur 18-jara. La sportistinoj de la gimnastika teamo de Hunan, kiu gajnis la ĉampionecon de la grupo A de gimnastika konkurso, havas meznombran aĝon de malpli ol 15 jaroj. En la korbopilkaj maĉoj de geknaboj, la junaj sportistoj ludis brave kiel tigroj. Nemalmultaj el ili jam mastras la fundamentajn teknikojn. En flugpilkaj maĉoj, la geknaboj jam povas ĝenerale uzi la fundamentajn teknikojn kaj taktikojn de la plenaĝuloj. Gilin-aj knabinoj fiŝsalte savis pilkon kaj Ŝenhi-aj knaboj kuraĝe blokadis serviran pilkon de la rivala teamo. . . Ĉio tio estas rezulto de rigora trejnado de niaj junaj sportistoj sub la zorgo de la Partio.

La kreskado de la nove aperintaj fortoj de niaj sportaj rondoj karakteriziĝas per pli granda rapideco, pli alta teknika startpunkto kaj pli granda nombro da eminentuloj. La



*Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj komentariistoj en la konkursejo*


teknika nivelo de nunaj 16- aŭ 17-jaraj sportistoj jam superis tiun de iuj veteranaj sportistoj de nia lando en iliaj samaj aĝoj. Rapide progresas grandnombraj junaj sportistoj de iuj sportaj disciplinoj, kiuj havas la esperon rapide atingi la avangardan nivelon de la tuta lando. Ĉio tio montras, ke la socialisma sportista vicaro de nia lando havas potencan bazon kaj tre vastan perspektivon.

Dum la konkursado, la sportistoj, sportaj laborantoj kaj reprezentantoj de avangardaj bazaj unuoj de sporta aktivado interparolis pri la bonega situacio de la sporta fronto, interŝanĝis sperton kaj samtempe ili rimarkis, ke en multaj sportobranĉoj ni ankoraŭ ne atingis la avangardan nivelon de la mondo. Ili esprimis sian volon klopodi por surgrimpi la plej altajn pintojn de sportaj teknikoj kiel la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio, kiu refoje surgrimpis la supron de Ĝomolangma.



*Sportistinoj de la korea nacieco ludas saltotabulon.*

*Korbopilka maĉo okazas en popola komunumo.*



# Ĉie estas karuloj en la patrolando

— Notoj pri la Tajvan-provinca Sporta Delegacio en kaj ekster la konkursejo

EN la Tria Tutlanda Sporta Konkurso de la Ĉina Popola Respubliko partoprenis la sporta delegacio konsistanta el 190 tajvan-provincaj sportaj laborantoj kaj sportistoj laborantaj aŭ lernantaj sur la ĉina ĉeftero, aŭ loĝantaj en Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Tio manifestis la profundan zorgon de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio al la dek ses milionoj da tajvan-aj samlandanoj. Kiel multe da neforgeseblaj aferoj aperis en la tagoj de kunestado de samlandanoj!

## EN AMO DE FRATINOJ

En la sporta halo eksplodas de tempo al tempo mankrakoj. Jen pekinaj skermistinoj akompanis tajvan-an skermistinon Liu Kianzeng en ekzercado. La 20-jara Liu Kianzeng komencis lerni skermadon nur en septembro de la pasinta jaro. Por altigi ŝian arton kiel eble plej rapide, skermistinoj de dekkelkaj provincoj kaj urboj helpis ŝin en ekzercado. Foje Liu Kianzeng ne kuraĝis forte piki timante, ke ŝia rapiro doloriĝos la nekovratajn brakojn kaj krurojn de sia rivalo pro nefirma tenado. La fratinoj divenis ŝian skrupulon kaj kuraĝigis ŝin dirante: "Piku forte, ni ne timas doloron!" Liu Kianzeng firme tenis la skermon kaj faris fortan pikon. "Brave! Bona atako!" Ilia kuraĝigo forte tuŝis la koron de Liu Kianzeng. Ŝi diris: "Ankaŭ en Usono mi vidis skermadon, sed tie la rilatoj inter sportistoj diferencas de tiuj inter niaj. El ili iuj deziregas, ke la rivaloj falu en honto, vundiĝu kaj fiasku. Ĉi tie vi uzas vian tempon trejnan kaj ripozan por helpi min en ekzercado, vi estas miaj rivaloj en konkurso, sed pli precize miaj kamaradoj!" "Inter la skermis-

*11-jaraj tablotenisistinoj Vang Jantong (maldekstre) de Tajvan-provinco kaj Koŭ Hujĝen de Henan-provinco starigis inter si amikecon en konkurso.*





*La Sporta Delegacio de Tajvan-provinco*

tinoj," ŝi daŭrigis emocie, "mi estas pliaĝa, sed eĉ la dekkelkjaraj sportistinoj prizorgas min kiel fratineton, ĉu mi povus resti nekortuŝita de tio!"

## NOVA MORO EN KONKURSEJO

Sur la konkursejo de bazopilko, tajvan-aj sportistoj jen helpis laborantojn ebenigi la placon, jen donis siajn metalajn bastonojn kaj sekurigajn maskojn al la rivaloj, ke ili uzu. Tajvan-a sportisto Liaŭ Vennan ĉiam kolektadis dismetitajn bastonojn sur la placo por ilin meti en ordo kaj kuradis por reporti pilkon forflugintan ekster la limojn. Tajvan-a sportisto Liu Ĉangjan kunportis je ĉiu maĉo plurajn mantukojn, ilin donis al rivaloj aŭ viŝis per ili ŝviton sur ilia dorso aŭ portis al ili teon. Amikeco pompe floris en kaj ekster la konkursejo.

Iutage, tajvan-aj tablotenisistinoj estis en intensa konkurso kun tibetaj tablotenisistinoj kaj trovis ke la fortoj de ambaŭ teamoj estas preskaŭ egalaj. En la lasta ŝlosila ludo, la tibeta teamo atingis superecon je 9 kontraŭ 4 poentoj. Subite la pilko flugis ekster la tablon kaj poentogajno estis juĝita al la tajvan-a teamo. Sed tiam la tajvan-aj sportistinoj Giang Ĝonghua kaj Ĉen Dongzi levis siajn manojn kaj raportis, ke ili frapis la pilkon survoje, do la tibeta teamo devas gajni la poenton. La juĝisto korektis sian eraron, kaj la rigardantoj varme aplaŭdis por la bona moralo de la tajvan-a teamo. Ankaŭ la tibetaj sportistinoj varme laŭdis ilian spiriton "unue amikeco".

## EN LA AŬTUNMEZA NOKTO

La aŭtunmeza nokto de Pekino kun hela plenluno estis tre agrabla. Ĝuang Zedong,

estro de la Ĉina Sporta Komisiono kaj Caj Hiaŭ, estro de la Tajvan-provinca Sporta Delegacio ĝoje pasigis tiun tradician feston simbolantan kuniĝon de familianoj, kune kun la tajvan-aj sportaj laborantoj kaj sportistoj. Tajvan-aj samlandanoj diris emocie: "Ĝoje kunvenante en Pekino kaj vidante la bonegan situacion de la patrolando, kiel ni povas ne pensi pri niaj suferantaj karuloj en Tajvan." Trejnisto de pafado Ma Kingŝan rememoris sian pasintan vivon en Tajvan. Tiam li laboris kiel instruisto de pafado kaj estis sportisto dum pli ol dek jaroj, sed poste fariĝis mizerulo, kaj devis sin vivteni per bredado de birdoj kaj vendado de ovoj. En la 11 jaroj post sia veno al la ĉeftero li kulturis nemalmultajn junajn pafistojn kaj tre ĝojis pro tio. Hju Ginlaj venis al la ĉeftero antaŭ 10 jaroj, li estis plurfoje elektita kiel avangarda laboranto, glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj nun estas estro de la atletika trupo. Iliaj personaj travivaĵoj elokvente pruvis, ke **"nur socialismo povas savi Ĉinion"**. Sportisto de la Gansu-a Bazopilka Teamo tiel emociiĝis, ke li verkis poemon:

*Lun-kukon, la simbolon de kuniĝo, prenu*
*kaj la ĝojplenan nokton tenu en memoro.*
*La antikvuloj ofte ĝemis sub la luno,*
*sed la plenlunon ni aprezas kun pli ĝoja koro.*
*Post liberiĝo de Tajvan, ni ĝuos kune*
*la belon de la lag' Ĵijuetan en ekskursa horo.*

Patosa deklamado de poemo, kantado kaj kriado de la slogano "Ni nepre liberigos Tajvan" vibris en la serena nokta aero. . .

*Tenisistinoj de Tajvan-provinco, kiuj loĝas en Japanio, interparolas kun tenisistinoj de la Interna Mongolio.*




## ELKORAJ VORTOJ


En Kantono tajvan-a sportisto Hie Giebing volis okulvitrojn, laboristo tuj pretigis ilin eĉ en postdejora tempo; en Pekino la tajvan-a bazopilka teamo bezonis kostumojn por la konkursado, laboristoj do pretigis tion akurate. Laboristoj diris, ke la tajvan-aj sportistoj estas iliaj samsangaj fratoj kaj ili volontas plenumi ĉiujn iliajn bezonojn.

Por esprimi sian profundan amon al la tajvan-aj sportistoj la instruistoj kaj lernantoj de la 108-a Mezlernejo de Pekino decidis brodi siajn korajn vortojn sur standardo kaj ĝin donaci al la tajvan-a teamo. La standardo surhavas 16 broditajn ideogramojn signifantajn: "En la grandioza sporta konkurso kunvenis samsangaj fratoj. Liberigu Tajvan kaj unuigu la patrolandon." La estro de la Tajvan-a Sporta Delegacio Caj Hiaŭ diris: "La brodita standardo plena je profunda frata amo estas donacaĵo ne nur al la delegacio sed ankaŭ al la dek ses milionoj da tajvan-aj samlandanoj." Jes, ni neniam forgesos la samsangajn fratojn en la abismo de sufero, ĉiam sopiras ilin kaj deziras kuniĝi kun ili. Liberigi Tajvan kaj unuigi la patrolandon estas la komuna voĉo de la tuta ĉina popolo.

BAJ MU:

# Nova Generacio de Gimnastoj

— Intervjuo de la Virina Gimnastika Teamo de Hunan-provinco



*Moderna gimnastiko de Han Baŭĝen*

EN la septembra Pekino regis serena kaj agrabla vetero. La nomita teamo veturis al Pekino kun siaj fruktoj de trejnado. La teamo konsistis el 7 gimnastinoj kun meznombra aĝo de 14.5 jaroj. En la tagoj de koncentriĝa trejnado, sub la gvido de la partia filio la teamo persiste faris al si edukon pri politika linio kaj diligente kaj rigore sin ekzercis en tekniko. En la gimnastika konkurso de la Tria Tutlanda Sporta Konkurso de la Ĉina Popola Respubliko, tiu teamo gajnis la ĉampionecon de virina teama gimnastiko.

## ALLOGAJ SCENOJ

Antaŭtagmeze de la 17-a, kun gaja humoro spektatoroj de Pekino rigardis brilan prezentadon de la Virina Gimnastika Teamo de Hunan-provinco.

Komenciĝis la virina transsalto de senansa ĉevalo. La gimnastinoj unu post alia fluge kuris laŭ la verda kaŭĉuka kurejo kaj transsaltis la senansan ĉevalon. Post rapida kurado gimnastino Vang Hjuegjun sin ĵetis en la aeron helpe de trampolino kaj gracie flugis kvazaŭ printempa hirundo kun etenditaj flugiloj. Ŝi ambaŭmane ekpuŝis la senansan ĉevalon, releviĝis, kuntiriĝis, faris dorsentranskapiĝon kaj surteriĝis senŝanceliĝe. Ŝiaj lertaj, fortecaj kaj seneraraj movoj gajnis tondran aplaŭdon. Tiu sportistino nun estas 17-jara. Ŝi foje gajnis la ĉampionecon de kunmetita konkurso de la ĉina knabina gimnastiko kaj plurfoje vizitis fremdlandojn kiel membro de la ĉina gimnastika teamo.

La 12-jara Lej Jang estas la plej juna en la teamo, sed ŝi havas firman volon. Ŝi sin ekzercis tre diligente kaj faris ĉiun movon severe laŭ plej ĝusta postulo en trejnado. En la gimnastika konkurso de ĉijara majo, ŝi gajnis la ĉampionecon de trabado kaj en ĉifoja prezentado ŝi atingis novan nivelon en tiu disciplino.

Akompanate de piana melodio kun nacia stilo, 13-jara Hu Ging prezentis liberan gimnastikon sur verda grundgimnasta spaco de 12 × 12 metroj. Ŝi faris flanken-transkapiĝon per helpo de kuro kaj korpoturniĝon de 180 gradoj, tuj sekve malantaŭen-transkapiĝon, rektakorpan enaeran malantaŭen-transkapiĝon kaj korpoturniĝon de 720 gradoj. "Brave!" laŭdoj leviĝis ĉe la spektatoroj de tempo al tempo. La serenaj paŝoj kaj viglaj movoj de Hu Ging spegulis la vivecplenan spiritan fizionomion de la ĉina popolo en la socialisma epoko. Ŝiaj gimnastikaj movoj estis akompanataj de muziko kun aparta gusto de Hunan-a Huagu-opero, kio donis al la spektatoroj fortan artan impreson. . .

## DILIGENTA EKZERCADO

Antaŭ kelkaj jaroj la virina gimnastiko de Hunan-provinco ankoraŭ estis relative postiĝinta. Kial la teamo progresis tiel rapide en tekniko kaj povis akiri tiel grandan sukceson en la Tria Tutlanda Sporta Konkurso? Kun tiu problemo mi intervjuis la gimnastikan teamon.

La gvidanto de la teamo kamarado Ĝang Junĝoŭ diris modeste: "Nia gimnastika teamo povis akiri kelkajn sukcesojn ĉefe dank' al tio, ke ni energie faris edukon pri la batalo inter la du linioj, memkonscie efektivigis kaj plenumis la revolucian sportan linion de Prezidanto Maŭ kaj due dank' al la diligenta ekzercado de la sportistinoj, la pacienca direktado de la trejnistinoj kaj la helpoj de frataj teamoj." Kaj fakte tiel estis. Ekde la koncentriĝa trejnado, la partia filio unue aranĝis refojan vizitadon de la sportistinoj al la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ en Ŝaŭŝan, al la Hunan-a Unua Pedagogia Lernejo kie Prezidanto Maŭ studis kaj komencis revolucian aktivadon, kaj sendis ilin al la komunumo Bancang de Ĉangŝa-gubernio, la hejmloko de la revolucia martirino Jang Kajhuj, por ricevi reedukadon de tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Dank' al tiuj aktivadoj la teamanoj plie komprenis, ke la sporta aktivado de la nova Ĉinio estas nemalhavebla konsistiga parto de la socialismaj revolucio kaj konstruado. La venkoj de la ĉina revolucio estas gajnitaj dank' al la direktado de Maŭzedongpenso. Gimnastikado celas nek famiĝon nek profiton, ĝi estas la bezono de la revolucio. Unuvorte, tio celas fortigon de la korpo kaj defendon de la patrolando. Ĝuste pro tio ke la sportistinoj havas tiun firman kaj ĝustan politikan direktadon, ili sin ekzercis tre diligente. Ili estas naivaj knabinetoj en la okuloj de la gepatroj, tamen sentimaj batalantinoj en ekzercejo. Ĉiu el la elegantaj kaj lertaj movoj pasis en palpebrumo antaŭ la okuloj de la rigardantoj, tamen por bone fari ĝin, la sportistinoj devis fari multajn ekzercojn. Por mastri ĉiun el la movoj malfacilegaj, sportistino Han Baŭĝen sin ekzercis penige kaj spertis sennombrajn malsukcesojn. Anstataŭ deprimiĝi post ĉiu malsukceso, ŝi ĉiamaniere klopodis por trovi la kaŭzon kaj daŭrigis sian ekzercadon. Kiel admirinda estas tia firma volo de la sportistinoj kaj ilia revolucia spirito timi nek penigon nek morton! Antaŭ la sporta konkurso la sportistinoj meminiciate plimultigis sian trejnan tempon kaj sin ekzercis eĉ en ferioj kaj festotagoj. Iufoje trejnistino Ĉeng Hujgjun rimarkis, ke Lej Jang aspektis pale kaj, karesante ŝian ka-



*Gimnastinoj*

pon, demandis zorgeme: "Lej Jang, ĉu vi fartas nebone?" Kun larĝe malfermitaj okuloj Lej Jang diris al la trejnistino: "La geonkloj de la Ĉina Montogrimpa Ekspedicio neniam retiriĝis antaŭ penigoj, malfaciloj kaj eĉ morto. Ankaŭ mi ne devas timiĝi antaŭ malfaciloj!" Kiel firmdecidaj estas la simplaj vortoj! Trejnistino Ĉeng brakumis Lej Jang kaj, balancante la kapon, diris: "Bravulino, bravulino!"

### KOMUNA PROGRESADO

Iutage mi demandis al Vang Hjuegjun: "Ĉu gimnastika trejnado estas peniga?" Elmontrante siajn manojn kun dikaj kaloj ŝi diris ridetante: "En la penigoj sin trovas plezuro, la vivo de nia kolektivo estas tre gaja. La trejnistinoj estas niaj bonaj instruistinoj kaj amikinoj, la teamaninoj interrilatiĝas kiel fratinoj. Se iu ajn havas malfacilojn, ĉiuj alvenas por ŝin helpi, vere bonege!" Sportistino Tang Hiaŭjing diris al ni emocie: "Kiam mi ekzercis min sur horizontala trabo en la descenda movo post flanken-transkapiĝo, rektakorpaj enaeraj transkapiĝoj de 720 gradoj, mi ne povis mastri la ŝlosilan punkton de la movo. Pro tio mi estis tre maltrankvila. Trovinte tion kamaradino Tang Hiangjuan tuj alvenis kaj prezentis al mi sian sukcesan sperton en tio. Poste ŝi faris al mi praktikan demonstradon."

Modesteco kaj lernemo estas bona stilo de la gimnastika teamo. Nelonge post la koncentriĝa trejnado, la teamo speciale veturis al la Virina Gimnastika Teamo de Giangsu-provinco por lerni de ĝi bonan sperton kaj stilon en kreado de malfacilegaj movoj. De tiam la membrinoj de la du teamoj fariĝis amikinoj. Antaŭ sia veturo al Pekino iu teamanino de la hunan-a teamo skribis al la sportistino Hju Lin de la giangsu-a teamo por kuraĝigi ŝin fari la malfacilegan movon de ducirkla enaera malantaŭen-transkapiĝado



*Trejnistino Ĉeng Hujgjun kun siaj lernantinoj*

en la Tria Tutlanda Sporta Konkurso. Kaj ŝi aldonis en la letero jenan poemon:

*Mi kore deziregas, ke la kunbatalantino*
*sukcese faru transkapiĝoparon en l' aero,*
*senĉese venku ĉiujn malfacilojn kaj danĝerojn*
*en la strebado al pli kaj pli alta artnivelo.*

Kaj vere tiel okazis: Hju Lin sukcese faris tiun movon la unua en la konkurso. La kunbatalantinoj gratulis ŝin pro ŝia sukceso.

* * *

Je la fino de mia vizito, kamarado Ĝang Junĝoŭ montris al mi kelkajn taglibrojn de sportistinoj. En tiu de Tang Hiaŭjing troviĝas jenaj vortoj: "Tenante la patrolandon en la koro kaj ĉirkaŭprenante la mondon en la vido, mi min ekzercos diligente por atingi novan nivelon de gimnastiko!"

En tiuj junaj sportistinoj mi vidis ilian noblan penson. Ili ne fieras antaŭ sukcesoj kaj strebas al granda celo. Mi vidis la sanan kreskadon de la nova generacio de niaj sportistoj kaj la brilan perspektivon de la ĉina sporto!

ĜONG VEN:

# Nova moro en konkursejo

—Notoj pri la Tria Tutlanda Sporta Konkurso

ĈIE sur la diversaj konkursejoj de la Tria Tutlanda Sporta Konkurso vidiĝis kortuŝaj scenoj de solidareco en batalo. Estis pli ĝojinde, ke la vastaj amasoj de sportistoj harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio montris tute novan spiritan fizionomion kaj noblan stilon.

## ANKAŬ ILI PARTOPRENIS EN DECIDAJ MAĈOJ

Laŭ la regularo de korbopilka konkurso de la tutlanda sporta konkurso, nur 12 teamoj, kiuj venkis en la tri konkursaj regionoj, rajtis partopreni en la decidaj maĉoj en Pekino. Tamen la Virina Korbopilka Teamo de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, kiu perdis la elektan maĉon, partoprenis en la decidaj maĉoj en Pekino kiel la dektria teamo. Kiel tio okazis?

En la grava maĉo, kiu decidis ke ĝi partoprenu aŭ ne en la decidaj maĉoj, ĝi malvenkis pro eraro de la juĝisto. Malgraŭ tio, ke ili bone rimarkis la eraron, ili tamen senrezerve obeis la juĝon. Ilia nobla stilo rikoltis laŭdojn de la vastaj rigardantoj. Por laŭdi tian bonan stilon de konkurso kun la proleta politiko en komando la prepara komitato de la sporta konkurso decidis inviti la virinan korbopilkan teamon de Guanghi partopreni en la decidaj maĉoj en Pekino.

## AKVO DE AMIKECO

Ĉe la cellinio de vira ŝosea biciklado de 172 kilometroj oni ĉirkaŭis sportiston Sun Ĝanbo, iuj gratulis lin pro lia sukceso kaj aliaj laŭdis lin pro lia nobla stilo.

Sun Ĝanbo estas laboristo de la Jongding-a Maŝin-fabriko de Pekino kaj aĝas 21 jarojn. Antaŭ la konkurso lia patro diris al li: "Kiel filo de laboristo, vi ne devas pensi nur pri ĉampioneco, sed teni amikecon en la koro." Ankaŭ sekretario de la partia filio de la bicikla teamo instruis ĉiujn teamanojn, ke ili venku la burĝajn pensojn per la proletaj. La admonoj de la karuloj vastigis la vidkampon de Sun Ĝanbo kaj li decidis ĉiamaniere altigi la nivelon de sporta tekniko por la Partio kaj la popolo, sed ne por persona honoro.

Komenciĝis la bicikla konkurso. Sur la ŝoseo de Pekino ĝis Janking la sportistoj flugis antaŭen. Rezisto de vento kaj diversaj komplikaĵoj de la vojsurfaco, precipe kelkaj grandaj deklivoj kaj dekkelkaj vojkurbiĝoj multe konsumis la forton kaj energion de Sun Ĝanbo, kiu kuris ĉiam antaŭe. Dum la malfacila biciklado Sun Ĝanbo jam trinkis du el la tri boteloj da akvo kunportitaj de li. Li sentis soifon neelteneblan, tamen akvo estis pli bezonata por la biciklado de la restantaj kelkdek kilometroj. Tiam iu konkursanto de la frata teamo mansvingis al li kaj li divenis, ke li volas akvon. Kiel kara estas akvo por sportistoj de longdistanca

biciklado. Tamen li rigardis amikecon pli kara ol akvo. Li do senhezite donis sian lastan botelon da akvo al li. Soifanta, tamen viglanima li brave sturmis antaŭen. Fine li atingis la cellinion per 5 horoj, 1 minuto kaj 27.8 sekundoj kaj per tio gajnis personan ĉampionecon.

## DEDIĈI TEKNIKON AL LA POPOLO

En la granda halo de ŝakludado la plena silento aludis streĉecon kaj intensecon de la maĉo. La ŝakludantoj pripensadis sian aranĝon, atakon kaj defendon per dialektiko.


En maĉoj de la pasintaj kelkaj tagoj goludanto Ĉen Zude de la ŝanhaja teamo superis kelkajn debutantojn per malpli ol unu globeto. La rapida progreso de la junaj goistoj multe ĝojigis Ĉen Zude kiu ludis goon jam pli ol 20 jarojn. Por helpi junajn kamaradojn levi ilian teknikon li ofte detale klarigis, post la finiĝo de maĉo, la ĵus faritan batalon, plene jesis la superecon de la rivalo kaj instruis lin kiel profiti lian malfortan punkton por gajni la ludon.

En ordinara ekzercado li sincere traktis ĉiujn, kiuj venis al li por interŝanĝi sperton, ĉu ilia ludarto estas alta aŭ malalta. Foje li samtempe ludis kun 12 malgrandaj goistoj fervore helpante ilin. Vidinte tion iuj maljunaj goistoj ekmemoris ke en la malnova socio se iu ordinara novico volis ludi goon kun famulo, li devis pagi multan monon por tio. Sed nun Ĉen Zude kaj multaj aliaj sportistoj senrezerve oferis siajn scion kaj teknikon al la popolo por kontribui al disvolviĝo de la socialisma sporta afero.

Same kiel en ŝakludo, en la tutlanda sporta konkurso tia komunisma penso rimarkinde disvolviĝis, senĉese vastigis la vidkampon de homoj kaj ŝanĝis la rilatojn inter ili.

En la konkursejo de arkopafado ŝanhajaj sportistoj pacience helpis hingiang-ajn konkursantojn; sur la konkursejo de pafado siĉuan-aj sportistoj varme zorgis tibetanajn samlandanojn; la Gansu-a Bicikla Teamo ne havis trejniston, la Ŝanhi-a Teamo sendis al ĝi veteranan trejniston; . . . Ja ĉie vidiĝis nova moro kaj ruĝis ĉie floroj de solidareco.

*Lancĵetistinoj interŝanĝas sperton en konkursejo.*




# Hingiang antaŭen marŝas en la batalo kontraŭ reviziismo

EN la 1-a de oktobro pli ol cent mil diversnaciecaj popolanoj de Urumĉi, ĉefurbo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kunvenis kaj paradis por varme kaj solene celebri la 26-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (HUAR), ĝoje aklamante la grandajn sukcesojn de HUAR en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la pasintaj 20 jaroj kaj la grandan venkon de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la nacia politiko de la Partio.

*La Centra Delegacio donacas gratulan standardon al la diversnacieca popolo de Hingiang.*





*Grandioza mitingo en Urumĉi por celebri la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la aŭtonoma regiono.*

Estro de la Centra Delegacio Ĉen Hilian, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj Sajfudin, alterna membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ, vicprezidanto de la Konstanta komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, unua sekretario de la Partia Komitato de HUAR de KPĈ, estro de la Revolucia Komitato de HUAR kaj unua politika komisaro de la Hingiang-a Milita Regiono, faris paroladojn respektive en la celebra kunveno. Ulanf, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj vicestro de la Centra Delegacio, laŭtlegis en la kunveno gratulan telegramon de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro. Post tio la Centra Delegacio donacis gratulan standardon kun jena surskribo en la hana kaj ujgura lingvoj: "La diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando, unuiĝu kaj venke marŝu laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!" Je la fino de la kunveno Ismajil Ajmat, membro de la Centra Komitato de KPĈ, sekretario de la Partia Komitato de HUAR, vicestro de la Revolucia Komitato de HUAR kaj politika komisaro de la Hingiang-a Milita Regiono, laŭtlegis salutan telegramon al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio.

En la tago de la festo Urumĉi troviĝis en maro de freŝaj floroj kaj arbaro de ruĝaj flagoj kaj ĉie regis atmosfero de solidareco kaj ĝojo. Frumatene amasoj de diversnaciecaj popolanoj en festaj vestoj torentis de ĉiuj flankoj al la kunvenejo — la Popola Placo, ludante tamburinojn, surnaojn kaj aliajn naciajn muzikilojn.

La Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono fondiĝis en 1955 sur la bazo de la demokratia revolucio. En la pasintaj 20 jaroj la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang, sub la saĝa gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, marŝis per grandaj paŝoj en la batalo kontraŭ reviziismo en la socialisma konstruado kaj la socialisma revolucio, la revolucia solidareco pli kaj pli fortiĝis kaj la socialismaj rilatoj inter la naciecoj pli kaj pli firmiĝis kaj disvolviĝis. En la Granda Proleta Kultura Re-

volucio kaj Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio la diversnaciecaj popolanoj serioze studas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, kritikas la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj kritikas sovetunian reviziisman social-imperiismon, kaj per tio ili altigis sian konscion pri la batalo inter la du klasoj kaj la du linioj kaj pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Nombro da nacimalplimultaj avangarduloj havantaj komunisman konscion aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Kadroj de nacimalplimultoj kreskis grandnombre kaj ludas gravan rolon en diversnivelaj gvidaj postenoj. Celebrante la 20-an datrevenon de la fondiĝo de HUAR la Hingiang-aj diversnaciecaj popolanoj decidis pli kompakte unuiĝi kaj fari ankoraŭ pli grandan kontribuon al plifirmigo de la diktaturo de la proletaro kaj konstruado de la prospera socialisma Hingiang.

Hingiang estas regiono de multaj naciecoj inter kiuj la ujgura estas la ĉefa kaj la ceteraj estas la kazaĥa, hana, huja, ĥalĥaza, mongola, siboa, taĝika, uzbeka, tatara, dahura, manĉura kaj rusa. Antaŭ la Liberiĝo sub la reakcia regado de Kuomintango kaj pro incitado de la reakciaj klasoj, la nacieca malakordo kaj nacieca subpremado multe suferis la popolanojn de Hingiang. Sed nun en tiu regiono kun areo de sesono de la teritorio de la patrolando, la diversnaciecaj popolanoj starigis inter si novajn socialismajn naciecajn rilatojn de egaleco, solidareco, interhelpo kaj frateco, kaj la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado vigle disvolviĝas. En la pasintaj 20 jaroj la totala produktovaloro de industrio plimultiĝis je pli ol 400%, la totala produktokvanto de grenoj je pli ol 100% kaj la nombro de brutoj je 55%. Tie varprezoj estas stabilaj kaj la vendkvanto de varoj senĉese kreskas,

*Riĉa rikolto de tritiko de la 15-a brigado de Baŭzihong de Jengisar-gubernio de Hingiang*



kaj krome la tuta regiono ekspluatis sume pli ol 1,400,000 hektarojn da virga tero, konstruis forstozonon kun longeco de miloj da kilometroj kaj irigaciajn kanalojn kun totala longeco de pli ol 17,500 kilometroj kaj starigis centojn da fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj, en kiuj la diversnaciecaj laboristoj kune laboras kaj formis solidarajn kolektivojn de naciecoj. Grandaj sukcesoj estis atingitaj ankaŭ en aferoj de trafiko, kulturo, eduko, higieno, presado, scienca esplorado, fizikokulturo k.a. Ankaŭ la kultura kaj materia vivo de la nacimalplimultoj senĉese pliboniĝas surbaze de disvolviĝo de la produktado. En la pasintaj 20 jaroj la popolanoj de tieaj nacimalplimultoj kreskis je 44.2%. La antaŭe malriĉa kaj postiĝinta malnova Hingiang fariĝis nun prospera socialisma regiono.

Hingiang estas okcidenta landlima regiono de nia patrolando kaj estis multfoje invadita de imperiismo. En la lastaj pli ol dek jaroj la popolo kaj armeo de Hingiang en unuanima batalo plurfoje frakasis renversojn kaj armajn agresojn de la sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj rebatis la arman atakon de la hindaj ekspansiistoj kaj per tio faris kontribuon al defendo de la landlimo kaj firmigo de la nacidefendo.

En la ĝojaj tagoj de celebrado de la 20-a datreveno de la fondiĝo de HUAR, la membroj de la Centra Delegacio vizitis diversajn lokojn de Hingiang kaj intervidiĝis tie kun laboristaj, kamparanaj kaj soldataj reprezentantoj. La kora zorgo de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio multe kuraĝigis la diversnaciecajn popolanojn kaj ili decidis pli bone unuiĝi, serioze studi revolucian teorion, firme batali kontraŭ reviziismo, teni la revolucion kaj stimuli la produkton, laboron kaj preparon kontraŭ milito kaj akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

*Ujgura komunumano prikantas sian novan vivon.*



GJU HINHUA:

# La nova laboristaro de Tibeto

DANK' al la granda socia reformo la tibeta laboristaro naskiĝis kaj ascendis la historian scenejon. La apero de tiu nova klaso havas grandan historian signifon por ĝisfunde frakasi la regadon de la feŭdaj servutul-mastroj de Tibeto, fondi kaj firmigi la diktaturon de la proletaro gvidatan de la laborista klaso kaj bazitan sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj.

## I

Tuj post sia naskiĝo la tibeta laboristaro fariĝis nova gvida klaso kun plej alta politika konscio sub la gvido de sia avangarda organizaĵo — la Komunista Partio de Ĉinio, kaj nutrado de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Ĝi estas mastro de la ŝtataj entreprenoj de Tibeto, reprezentas la socialismajn produktajn rilatojn kaj estas revolucia avangardo en la batalo por konstrui la novan socialisman Tibeton, kaj pro tio ĝi posedas potencan vivpovon.

Sub la regado de la reakcia kaj putra servuta sistemo en la pasinteco Tibeto ne havis modernan industrion kaj la tibeta nacieco ne havis sian laboristaron. Dum la periodo de la paca liberigo de Tibeto, la trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"marŝu antaŭen kaj samtempe konstruu ŝoseojn"**, konstruis la Siĉuan-Tibetan kaj Kinghaj-Tibetan Ŝoseojn, kiuj transpasas multajn montojn kaj riverojn. Tiam granda nombro da servutuloj ambaŭflanke de la ŝoseoj iris kun siaj ĉevaloj kaj gruntbovoj por helpi ĈPLA malgraŭ malhelpo de la reakciaj servutul-mastroj. Poste nemalmultaj el ili enviciĝis inter la vojkons-



*Tibetanaj karbo-ministoj*



truantoj kaj fariĝis la unuaj laboristoj de Tibeto.

Kvankam la nombro de la tibetanaj vojkonstruantoj tiam ne estis granda, tamen ili estis liberaj de subpremado kaj ekspluatado kaj unuafoje en la vivo ĝuis novan rilaton de egaleco en la revolucia vicaro, tio vekis envion kaj aspiron de la vasta amaso de servutuloj kaj vidigis al ili aŭroron en la nova sistemo. La servuta sistemo propagandata de la reakciaj feŭdaj regantoj kiel sistemo senmorta ekŝanceliĝis en la koro de la servutuloj.

En 1954, kiam la du ŝoseoj malfermiĝis al trafiko, la popola registaro sendis de internaj lokoj hanajn laboristojn kaj maŝinojn al Tibeto kaj la tibeta popolo komencis disvolvi modernan industrion, tiel ke la moderna civilizacio entrudiĝis en la postiĝintan servutan socion. Multaj servutuloj kaj sklavoj forkuris el bienoj de siaj mastroj kaj iris serĉi la karan ĈPLA kaj hanajn laborantojn venintajn el internaj lokoj. En Lasao estis sklavo Laĝub, forĝisto de Dalai. En la malnova Tibeto forĝistoj estis en la plej malalta socitavolo kaj rigardataj de la feŭdaj regantoj kiel plej malrespektindaj "nigrostuloj". Ne povante elteni la subpremon de la mastrosinjoro li pretis forfuĝi el la homa infero por iri partopreni en la konstruado de civila aerodromo. Sed malfeliĉe tion rimarkis agento de Dalai kaj Laĝub estis ĵetita en malliberejon kaj kondamnita al severa puno. Tamen li ne fleksiĝis sub tio kaj diris al siaj filoj kiuj venis al la malliberejo por vidi lin: "Infanoj miaj, la subpremado de la mastrosinjoro estas netolerebla, iru serĉi ĈPLA kaj fariĝu laboristoj!" Poste liaj du filoj vere forfuĝis el la faŭko kaj fariĝis laboristoj de iu elektrejo. En 1959, kiam la ribelo de tibetaj reakciaj regantoj estis subpremita, Laĝub liberiĝis. Li fariĝis forĝisto en la Lasaa Aŭtoriparejo kaj glore aliĝis tie al la Komunista Partio de Ĉinio. Nun 5 el liaj 7 gefiloj estas laboristoj aŭ ŝtataj oficistoj kaj aliaj du lernas en altaj lernejoj en internaj lokoj.

Kun konsciiĝo de la servutuloj, pli kaj pli grandiĝis la laborista vicaro de Tibeto. En




*Hana kaj tibetana laboristinoj de la Lantekstila Fabriko de Linĉi lernas unu de la alia.*

1958 kiam oni komencis konstrui Ngaĉenelektrejon, Dalai kaj liaj sekvantoj ĉiamaniere malhelpis servutulojn partopreni en la konstruado. Tamen ilia intrigo vaporiĝis. Servutuloj en la ĉirkaŭaĵo de la elektrejo venis unuj post aliaj al la konstruejo, inter kiuj pli ol 1,500 ricevis poste la titolon de avangardulo kaj pli ol 700 fariĝis lertaj kvalifikitaj laboristoj.

La juna tibeta laboristaro havas fortan revolucian volon kaj faris eminentan meriton en la batalo por frakasi la feŭdan servutan sistemon kaj fondi popolan reĝimon. En 1959, kunagante kun ĈPLA ili rekte partoprenis en la batalo kontraŭ la reakcia ribelo. La reakcia ribelo estis subpremita kaj la lumo de Prezidanto Maŭ atingis la neĝmonton kaj la miliono da servutuloj de Tibeto liberiĝis.

## II

Post renverso de la reakcia regado de la feŭdaj servutul-mastroj la tibeta moderna industrio antaŭenmarŝas per gigantaj paŝoj kaj la laborista vicaro rapide grandiĝis. La nombro de la fabrikoj kaj minejoj de la tuta aŭtonoma regiono kreskis de 19 antaŭ la sub-



*Tibetana tornistino*

premo al la reakcia ribelo ĝis 80 kiam fondiĝis la aŭtonoma regiono kaj ĝis pli ol 250 nun, kiuj formis dekojn da lokaj industriaj branĉoj de elektro, karbo, metalurgio, maŝinkonstruado, prilaborado de lignoj, kemio, malpeza industrio, konstruaj materialoj k.a. La produkta valoro de industrio de 1974 estis preskaŭ 4-oblo de tiu de 1965, kiam fondiĝis la aŭtonoma regiono. En la tuta regiono estas pli ol 67,000 laboristoj kun tibetanoj kiel la ĉefa parto.

La multiĝo de laboristoj kaj finplenumo de la socialisma reformo ŝanĝis la klasan strukturon de la tibeta socio. Laboristoj kaj kamparanoj kaj paŝtistoj kiuj efektivigis kolektivigon fariĝis mastroj de Tibeto kaj la reakciaj feŭdaj regantoj estas senigitaj je rajto de regado. Tio havas grandan signifon por fondi kaj plifortigi la diktaturon de la proletaro en Tibeto kaj plifirmigi la defendon de la sudokcidenta landlimo de la patrujo.

La tibetaj laboristoj estis antaŭ nelonge kamparanoj kaj paŝtistoj. Tiu natura rilato inter ili ebligis al la laboristoj firme alianciĝi kun la kamparanoj kaj paŝtistoj, kio akcelis la disvolviĝon de la socialisma ekonomio de Tibeto. En la pasinteco fremdlandaj kapitaloj ĉiujare forrabis grandan kvanton da lano, feloj, butero kaj aliaj agrikulturaj produktaĵoj kaj kaŭzis dekadencon de agrikulturo kaj brutobredado kaj bankroton de la ekonomio en Tibeto. Nun Tibeto jam sin liberigis el rabado kaj ekspluatado de fremdaj kapitaloj, la laboristoj kaj kamparanoj interhelpas unuj la aliajn kaj la industrio kaj agrikulturo akcelas reciproke. En 1974 la kamparanoj kaj paŝtistoj de Tibeto vendis al la ŝtato 3750 tunojn da lano, per kio ili forte subtenis la lantekstilan industrion de Tibeto kaj aliaj lokoj de la patrolando. La kvanto de lanaj fadenoj produktitaj de la Linĉi-a Lantekstila Fabriko de Tibeto en 1974 estis 3-oblo de tiu de 1971 kaj la specoj de ĝiaj produktaĵoj plimultiĝis al pli ol 280. En la lastaj jaroj ĝiaj lanaj produktaĵoj ne nur kontentigis la bezonon de Tibeto, sed ankaŭ estis disvendataj en aliaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Krome la laboristoj de Tibeto pene disvolvas ankaŭ industrion por subteni agrikulturon. Nun en la tuta regiono jam konstruiĝis fabrikoj kaj riparejoj de agrikulturiloj. En la pasinteco oni uzis gruntbovojn por draŝado kaj bezonis tempon de 3-4 monatoj por plenumi tiun laboron. Nun multaj komunumoj kaj brigadoj jam havas draŝmaŝinojn kaj akvoturbinojn, dank' al kiuj oni povas plenumi draŝadon en nur iom pli ol unu monato.

Disvolviĝo de la moderna trafikado de Tibeto multe vigligis la interŝanĝon de materialoj inter urboj kaj kamparo, kaj evitigis al la kamparanoj kaj paŝtistoj la kruelan ekspluatadon kiun ili suferis en la pasinteco. En la malnova Tibeto pro malfacila trafiko paŝtistoj devis pagi al komercistoj kelkajn ŝafojn por 0.5 kilogramo da teo kaj unu ŝafon por skatolo da fremdlandaj alumetoj. Nun granda kvanto da vivbezonaĵoj estas rekte transportataj al diversaj gubernioj kaj

vendataj al kamparanoj kaj paŝtistoj en pli ol 1,100 ŝtataj magazenoj kaj vendaj kaj aĉetaj kooperativoj. Kontraŭ unu kg. da lano vendita al la ŝtato ili povas ricevi dekkelkajn kg. da salo, aŭ pli ol unu kg. da teo aŭ 80 skatolojn da alumetoj produktitaj de Tibeto. Laboristoj de la trafikaj fakoj de multaj jaroj transportis grandan nombron da novaj agrikulturiloj de internaj lokoj de la patrolando al Tibeto por subteni tie la agrikulturan produktadon. Tuj post finiĝo de la subpremo al la reakcia ribelo, tibetaj laboristoj ektransportis pli ol cent mil produktajn instrumentojn al kamparanoj kaj paŝtistoj. De 1960 ĝis 1964 ili enportis aliajn pli ol 1,300,000 instrumentojn. De la jaro 1971 la ŝtato ĉiujare transportas al Tibeto meznombre 5,000 tunojn da materialoj por subteni ĝian agrikulturon.

Kun disvolviĝo de la tibeta industrio prosperaj scenoj aperis sur la altebenaĵo. Linĉi, perlo de la altebenaĵo, estis antaŭe montvalo dornoplena, dezerta kaj frekventata de sovaĝaj bestoj. Nun laboristoj tie fondis pli ol 100 entreprenojn de lantekstilo, elektro, presado k.s. kaj per tio ĝi fariĝis nova industria urbo de Tibeto. Lasao, urbo de la meza epoko, nun jam fariĝis socialisma produkta urbo kun certa skalo, kaj la novaj konstruaĵoj estas 10-oblo de tiuj de la malnova Lasao kaj preskaŭ 30 mezgradaj kaj malgrandaj fabrikoj aperis en la valo de la Lasaa Rivero. Krome en Ĉamdo, Ŝkaze, Hoka, Nagĉu kaj urboj de Ngari konstruiĝis nombro da fabrikoj. La ŝanĝo de la fizionomio de la altebenaĵo kuraĝigas la tibetan popolon brave marŝi antaŭen laŭ la socialisma vojo.

## III

En la nova socialisma Tibeto la laborista klaso ĉiam staras en la fronto de la batalo por plifortigi la plenampleksan diktaturon super la burĝaro kaj ludas sian rolon kiel gvida klaso.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la tibeta laboristaro plenumis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj faris firman batalon kontraŭ la reviziismaj linioj de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. La laboristoj ankaŭ ascendis la scenejon de superstrukturo kaj partoprenis en la eduka kaj literatura kaj arta revolucioj. Ili kuraĝis rompiĝi kun reakciaj putraj konceptoj de mil jaroj, kuraĝis batali kontraŭ teokratio kaj rompi destinismon. Ili konstruis pli ol 300 diversgrandajn pontojn kaj pli ol 100 mezajn kaj malgrandajn hidroelektrejojn sur "diaj riveroj" netuŝeblaj en la pasinteco kaj konstruis la plej alte situantan minejon de la mondo en la pasinte nomata "dia monto". La revolucia spirito de la laboristoj multe kuraĝigis la milionon da liberigitaj servutuloj, kiuj diris: "Se la laboristoj povas rompi diecon kaj destinismon, ankaŭ ni kuraĝas ilin piedpremi." En la pasinteco servutuloj ne kuraĝis tuŝi karbon nekovritan sur la tero kaj rigardis brilajn glimon kaj kristalon kiel "diajn instrumentojn". Tamen nun ili aktive helpas geologiajn taĉmentojn en prospektorado, tiel ke malkovriĝis unu post alia minoj de metaloj fera, neferaj kaj raraj kaj de nemetaloj.

En la praktika batalo la tibetaj laboristoj senĉese altigis sian politikan konscion, kaj multaj eminentuloj el ili okupis gvidajn poziciojn de diversaj niveloj. Nun en preskaŭ ĉiuj pli ol 250 fabrikoj kaj minejoj estas tibetanaj laboristodevenaj kadroj diversnivelaj, en iuj fabrikoj la tibetanaj kadroj jam konsistigas 70% de la kadraro. Nun en la tuta aŭtonoma regiono pli ol 7,700 elstaraj laboristoj jam glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj 8,400 al la Komunisma Junulara Ligo. En la movado de studo de teorio pri la diktaturo de la proletaro ili starigis teoriajn studajn grupojn en fabrikoj, minejoj kaj ŝoseaj sekcioj. Nun en la regiono jam estas pli ol 5,000 laboristaj teoriaj aktivuloj.

La tibetaj laboristoj estas la ĉefaj fortoj por konstrui novan socialisman Tibeton. Ili certe faros ankoraŭ pli grandajn kontribuojn por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando kaj plifirmigo de la defendo de la sudokcidenta landlimo de nia patrujo.




## "INDIGNO DE SERVUTULOJ" — EKSPOZICIO DE GRANDAJ ARGILAJ SKULPTAĴOJ EN LASAO

Estis oficiale inaŭgurita la ekspozicio de grandaj argilaj skulptaĵoj "Indigno de Servutuloj", kiun preparis la skulptista grupo sendita de la Belarta Instituto de la Ĉina Centra Arta Universitato "La Sepa de Majo" al Tibeto, la instruistoj senditaj de la Belarta Instituto de Ŝenjang al Tibeto kaj la artistoj de la Tibeta Revolucia Ekspoziciejo.

La ekspozicio forte malkaŝis kaj akuzis la neindulgeblajn krimojn de la tibeta feŭda servuta sistemo, varme prikantis la batalemon de servutuloj kaj enkorpigis la brilan penson, ke la historio estas kreita de sklavoj. La eksponataj skulptaĵoj estas dividitaj en 4 partojn, nome "Hejmo de feŭda servutul-mastro", "Templo", "La tibeta reakcia registaro" kaj "Batalo de servutuloj". La ekspozicion konsistigis 106 grandaj argilaj homfiguroj, 6 bestofiguroj kaj 4 reliefoj kun pentritaj fonoj, lumoj, klarigoj kaj muziko. Rigardante la ekspozicion, multaj liberigitaj servutuloj indigne akuzis kun larmoj la barbaran hommanĝan feŭdan servutan sistemon. Komparante la pasintecon kun la nuna vivo, ili diris kun profunda kompreno: "Ni devas klopodi por ke nia idaro neniam forgesu la kruelan barbaran subpremadon kaj torturadon de la servutul-mastroj al ni, neniam forgesu la sangan krimon kaj ĉiam sekvu Prezidanton Maŭ kaj la Kompartion sur la socialisma feliĉa vojo."

## ABUNDA RIKOLTO DE FRUA RIZO

Sur la bazo de pliprodukto de rizo en la pasinta jaro, ĉijare nia lando kreis novan nivelon de hektara kaj totala produktokvantoj de frua rizo.


La provincoj kaj aŭtonoma regiono en suda Ĉinio, escepte de malmultaj lokoj trafitaj de naturaj katastrofoj, havis rikolton pli bonan ol tiu de la pasinta jaro. En la provinco Hunan, kiu havas pli ol 2,000,000 hektarojn da frua rizo, plejparto de la lokoj havis hektaran produktokvanton de pli ol 4,500 kg. La meznombra hektara produktokvanto en parto de la gubernioj de Ŝanhajo, Guangdong- kaj Ĝegiang-provincoj atingis pli ol 6,000 kg. La nombro de gubernioj, kiuj havis meznombran hektaran produktokvanton de pli ol 6,000 kg., estas duoblo de tiu de la pasinta jaro.

## ELDONO DE "ALBUMO PRI LA TIBETA AŬTONOMA REGIONO"

La albumo estis eldonita okaze de la 10-a datreveno de la fondiĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj varme akceptata de la vastaj amasoj.

La titolo de tiu ĉi grandformata eleganta albumo estis skribita de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de ĉiuj naciecoj de Ĉinio, en 1965. En la albumo estas faksimiloj de 4 manuskriptoj de instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri la laboro de Tibeto kaj fotoj pri akceptoj de Prezidanto Maŭ kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato al reprezentantoj de diversaj rondoj de Tibeto. La albumo kolektis pli ol 200 fotojn, kiuj vivece notis la grandan historian etapon, en kiu la tibeta popolo likvidis la feŭdan servutan sistemon kaj paŝis en la socialisman socion transsaltante kelkajn jarcentojn sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio en la lastaj 25 jaroj.


# La Tria Tutlanda Sporta Konkurso okazis en Pekino




La 12-an de septembro solene malfermiĝis en Pekino la Tria Tutlanda Sporta Konkurso de Ĉinio.



1.2.3. En la konkursejo lernejanoj de pekinaj mezaj kaj elementaj lernejoj kaj soldatoj de ĈPLA prezentas grandiozajn gimnastikajn ekzercojn.



2

3





Rigardantoj





Vira altsalto


Flugpilka maĉo




Virina lancjeto









Akvopilkado



Korbopilka maĉo en baza unuo.




Grandioza gimnastika ekzerco





Dektrijara gimnastino de la pekina teamo Liu Jinggjun gajnis la ĉampionecon de kunmetita individua konkurso.



Konkurso de biciklado



Virina stafetkuro de 4 × 100 metroj





Bazpilka maĉo

1. 2. 3. Interŝanĝi sperton



2







Konkurso de virina 100-metra barierkuro

3









Rajdo trans obstaklo

Trapezo

Motorciklo transsaltas obstaklon.



# 24-jara kampara vivo

— Vizito al veterana ruĝarmeano Deng Danming



*Deng Danming*

65-jara Deng Danming jam terkulturis 24 jarojn, reveninte al sia hejmloko en la jaro 1951. En tiuj jaroj, li ĉiam konservis la revolucian spiriton tenatan dum la revoluciaj militoj, vivis vivon saman al tiu de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj laboris sinforgese por konstrui novan socialisman kamparon. Dum nia vizitado, tieaj kadroj kaj komunumanoj rakontis al ni multajn kortuŝajn aferojn faritajn de li.

## "MI VOLAS ESTI MODELA SOLDATO"

Deng Danming aliĝis al la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en 1930. Sur la vojo de la Longa Marŝo li laboris kiel politika direktanto de kompanio, en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito li estis estro de la sesa kompanio de la 48-a regimento de la 359-a brigado, kaj estro de la ŝua sekcio de armea provianta departemento. En la longa milita periodo li spertis multajn batalojn. Sur militejoj li ĉiam sturmis la unua sinofereme kaj estis dufoje vundita. Pro tio li estis honorita kiel superklasa batalmodelo.

Komisiite de partia organizo, li starigis, post reveno al sia hejmvilaĝo, bazajn partiajn filiojn unu post alia en la subdistriktoj Hiaking, Ĉangji kaj Danan. Post kiam stariĝis la Danan-a partia filio, oni volis elekti lin kiel partifilian sekretarion, sed li rifuzis dirante: "Peza ŝarĝo hardas homojn, tion ni lasu al junulo." Li persiste proponis elekti junan partianon kiel sekretarion.

Iu demandis: "Kio maljuna Deng volas esti, se ne sekretario de la partia filio?"


Deng Danming serene respondis: "Mi volas esti modela soldato."

La supre menciita frazo havas neordinaran historion. En la jaro 1936, post la "Hi-an-a Evento" la Kompartio kaj Kuomintango komencis sian duan kunlaboran periodon, la Ruĝa Armeo reorganiziĝis en la Okavojan Armeon, kaj pro tio granda nombro da kadroj devis fariĝi soldatoj. Tiam gvidanto petis opinion de Deng Danming kaj la lasta diris firmdecide: "Mi volas fariĝi modela soldato." Poste li servis kiel soldato de garda kompanio. Post la batalo ĉe Tiangiaĝuang, li estis honorita kiel heroo; kaj en hospitalo pro vundiĝo, li estis nomita de kuracistoj, flegistinoj kaj aliaj vunditoj modela paciento.

En la malfacilaj jaroj de revolucia milito, li estis modela soldato, kaj en la periodo de

la socialisma konstruado, li ankoraŭ konservas sian revolucian naturon. Li ĉiam rigardas ŝanĝon de laborposteno kiel bezonon de la revolucio. Kiam li laboris kiel gvidanto, li neniam sintenis burokrate, sed ĉiam la unua luktis kontraŭ malfaciloj, sturmis al malamikoj kaj laboregis por la revolucio. Kiam li servis kiel ordinara soldato, li restis same plena de entuziasmo kaj laboris fervore. Kiam aperis alta tajdo de agrikultura kooperativigo en Danan, li kaj aliaj gvidantoj de la partia filio kune konsiliĝis pri tio kiel rapidigi la konstruadon de Danan, utiligante la bonan kondiĉon de kooperativigo. En la kunveno Deng Danming rakontis heroajn aferojn faritajn de popolanoj de la revolucia bazloko en norda Ŝenhi-provinco en reformado de montoj kaj riveroj. Li diris, ke Nannivan siatempe estis dezerta malriĉa montvalo. Veninte al la loko, la 359-a brigado venkis multajn malfacilojn, efektivigis post unu jaro la alvokon de Prezidanto Maŭ **"Eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝajoj"** kaj ŝanĝis Nannivan en riĉan lokon de norda Ŝenhi-provinco. La Nannivan-a spirito lumigis la korojn de la respondeculoj de la partia filio kaj kuraĝigis ankaŭ la amasojn. En vintro de la jaro 1956, ili komencis konstruadon de la Hiagiaĉong-a Akvorezervejo. Dum la konstruado, same kiel en la batalado ĉe Nannivan, Deng Danming manĝis kaj loĝis ĉe la konstruejo. Ĉiutage, li la unua venis al la konstruejo kaj la lasta forlasis ĝin, kaj eĉ ne revenis al sia hejmo nur 2 kilometrojn fora dum pli ol ses monatoj. Post penema laboro de kadroj kaj amasoj en unu vintro kaj unu printempo, la Hiagiaĉong-a Akvorezervejo estis finkonstruita kaj dank' al tio pli ol 70% de la kampoj de Danan ŝanĝiĝis en kampojn de garantiata riĉa rikolto ĉu en tromulteco aŭ tromalmulteco de pluvo. En la jaro 1957, kvankam la loko suferis de sekegeco, tamen ili gajnis grandan riĉan rikolton. De tiam oni ekkulturis en Danan rizon dufoje en unu jaro.

*Deng Danming kun membroj de la partia filio de la brigado projektas estontan konstruadon.*



## ĈIAM RESTI KUNE KUN AMASOJ

Kiam Deng Danming ĵus revenis al Danan, multaj konjektis ke li kiel veterana ruĝarmeano kaj malnova kadro certe forlasos la vilaĝon post kelkaj tagoj.

Neatendite, Deng Danming revenis al Danan kaj fiksloĝis en ĝi.

Danan estis malriĉa loko kun tre malalta agrikultura produktokvanto kaj oni vivtenis sin per vendo de brullignoj. Antaŭe inter amasoj cirkulis diro ke "oni suferos malsaton se ili ne vendas brullignon en tri tagoj". Post la Liberiĝo, kvankam oni faris tie agraran reformon kaj granda ŝanĝo okazis al la loko, tamen oni vivis ankoraŭ malfacile sub la malnovaj produktaj kondiĉoj.

Tiam, iu kamarado laboranta en la gubernia urbo venis al Deng Danming kaj trans-

donis al li la proponon de gvidanto ke li transloĝiĝu en la gubernian urbon. Deng Danming decideme diris al la kamarado: "Jes, nun ni ja havas malfacilojn, sed ili estas provizoraj kaj venkeblaj same kiel la malfaciloj renkontitaj de ni en grimpado de neĝmontoj, trapasado de la marĉa herbejo kaj batalado ĉe Nannivan. Kompare kun la vivo en la malnova socio, nun ni vivas centoble pli bone." Li rifuzis la proponon.

Oni opiniis, ke li havas revolucian meriton kaj devas ĝui bonajn vivkondiĉojn. Li tamen diris: "En la tempo, kiam oni organizis kamparanan ligon kaj starigis vilaĝan sovetan reĝimon, ĉiuj malriĉaj kamparanoj de la vilaĝo ĵetis sin en la revolucion. Kiam eksplodis batalo, membroj de la kamparana ligo tuj ekagis ĉie kun lancoj kaj mallongaj bastonoj. Kiu ne riskis sian vivon por la revolucio?" Ĉiufoje kiam li rememoris, ke 48 homoj de la vilaĝo oferis sian vivon por la revolucio kaj malriĉaj amasoj multe suferis, post perdo de sia reĝimo, torturon fare de bienuloj, li larmis pro malĝojo. Li multfoje esprimis, ke li estas feliĉa postvivanto kaj devas klopodi por fari la nefinitan laboron, restigitan de la martiroj por bone konstrui novan Danan.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, Deng Danming portis samajn vestojn kaj manĝis samajn grenojn kiel la aliaj. Li neniam sin apartigis de la amasoj kaj vere efektivigis sian ĵuron, ke li volas dividi dolĉon kaj maldolĉon kun la amasoj. Pro tio amasoj ĉiuj kore estimas lin.

## "DAŬRE ANTAŬEN, KIAM DAŬRAS LA SPIRO"

La vorto "daŭre antaŭen, kiam daŭras la spiro" ofte dirata de Deng Danming devenis jene:

Sur la vojo de la Longa Marŝo, kiam la Ruĝa Armeo baldaŭ iros el la marĉa herbejo, Deng Danming jam fariĝis tre malforta kaj por fari ĉiun paŝon li devis pene streĉi siajn fortojn kaj li povus facile fali se li iomete malstreĉus sian atenton. En la kriza momento, la politika komisaro de la regimento kuraĝigis lin: "Prezidanto Maŭ alvokas nin en la fronto kaj esperas ke la ariero rapide proksimiĝos al li. Kunpremu viajn dentojn, elstarigu vian bruston kaj daŭre antaŭen marŝu, kiam daŭras via spiro!" Kuraĝigate per la spirito, Deng Danming fine venkis multajn malfacilojn kaj atingis nordan Ŝenhi-provincon.

De tiam Deng Danming ĉiam tenas la vorton kiel sentencon en sia koro.

Iun tagon en la fino de aŭtuno, 1965, por elekti situejon de akvorezerveja baraĵo, li iradis tien kaj ĉi tien por observi la fluajn direktojn. Neatendite, li falis de sur vojeto de monto en ŝliman kampon. Vidinte tion, iu komunumano tuj rapidis al li. Li levis lin, forviŝis la koton de sur lia vizaĝo kaj trovis lin sveninta kun vizaĝo pala kaj membroj malvarmaj. Informiĝinte pri tio, komunumanoj kun peza koro rapidis al li kaj maltrankvile vokis: "Vekiĝu, Maljuna Deng! . . ." Post urĝa savado, Deng Danming fine rekonsciiĝis. Rigardante ĉirkaŭe la ridetantajn vizaĝojn kun larmoj, trovinte apude la sukeritan zingibran dekoktaĵon, teon kaj brankardon, li estis tre forte kortuŝita kaj pensis: "En la malnova socio mi paŝtis bovojn por bienulo sur la monto kaj tie mi ofte vidis kadavrojn de malriĉaj kamparanoj mortintaj de frosto aŭ malsato forĵetitajn de bienuloj. Sed nun amasoj de la tuta vilaĝo zorgas min tuj post mia akcidento. Ho, kiel bonaj estas la amasoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Mi devas multe kaj multe labori por ili! Kiam mi spiras, mi ankoraŭ devas antaŭen marŝi!" Li forviŝis siajn larmojn, forigis la koton de sur sia korpo kaj tuj stariĝis por daŭrigi sian laboron rifuzante la konsilon de la amasoj ke li ripozu en hospitalo.

Ĝuste tiel Deng Danming ĉiam konservis **"tiajn energiecon, revolucian entuziasmon kaj sindonemon, kiajn ni havis en pasinteco dum revolucia milita periodo por daŭrigi la revolucian laboron ĝis la fino".**

HIANG JANG:

# Bredejo de buntafelaj Semŝafoj

EN frua aŭtuno, la stepo de la Interna Mongolio sub la serena ĉielo prezentas plaĉan bildon al la okuloj. La senliman herbokovron ornamas multaj konataj kaj nekonataj sovaĝaj floroj, tiel ke ĝi aspektas ankoraŭ pli ĉarma. Sur la paŝtejoj, grasaj ŝafoj, ĉevaloj kaj bovoj avide manĝas herbojn aŭ petole kuras unu post alia. Inter la sennombraj ŝafaroj malrapide moviĝantaj, plej okulfrapaj estas la Sanbej-ŝafoj kun buntaj feloj. Nun la nombro de tiu bona specio de ŝafo enkondukita en Ĉinion post la Liberiĝo jam superis cent dek mil en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Antaŭ nelonge ni vizitis la unuan bredejon de semŝafoj de la aŭtonoma regiono, nome la Sanbej-semŝafan Bredejon de Juegintan kaj detale informiĝis pri la bredado de tiaj ŝafoj.

## VALOREGAJ EN LA INTERNACIA FELOMERKATO

Sanbej-ŝafo estas longvosta kaj dikhara, tre taŭgas por liveri felon, lakton kaj viandon. Origine ĝi vivis en dezerto de Centra Azio kaj fariĝis bona specio de ŝafida felo dank' al longa bredado. Nun ĝi estas bredata en multaj landoj de la mondo.

La felo de Sanbej-ŝafido kun neordinaraj bukloj estas bunta kaj taŭga por fari vestojn, ĉapojn, kolumojn ktp. pro siaj brilaj solidaj bukloj kaj eleganta desegno. En la internacia merkato de feloj ĝi estas varme akceptata same kiel tiu de mustelo.

Sanbej-ŝafo liveras ankaŭ lanon, viandon kaj lakton en kompare granda kvanto. Ĉiujare oni povas tondi dufoje lanon de virŝafo je 3 ĝis 3.5 kg., de ŝafino je 2.5 ĝis 3 kg., kaj de iuj eĉ je 6 kg. La viando de tia ŝafo estas relative bonkvalita, kaj ĉiu ŝafo povas liveri viandon je duono de sia korpopezo. Ĝia vosto povas doni 2 ĝis 3 kg. da graso. Ŝafino povas liveri bonkvalitan lakton dum 120 tagoj en ĉiu jaro.

Sanbej-ŝafo estas gregiĝema, lerta en marŝo kaj facile paŝtebla. Ĝi havas fortan apetiton, grasiĝas rapide, povas elteni sekecon, varmon kaj ankaŭ froston, kaj facile akomodiĝas al malfekunda stepo kun maldensa flaŭro.

En 1951 Ĉinio enkondukis tiun specion de ŝafo kaj rapide ĝin disvastigis. Nun ĝi estas bredata en Hingiang, la Interna Mongolio, Gansu kaj aliaj 15 aŭtonomaj regionoj kaj provincoj. La Sanbej-semŝafa Bredejo de Juegintan estas fondita en la komenco de la sesdekaj jaroj. De tiam ĝi liveris grandan nombron da pursangaj Sanbej-semŝafoj al 13 aŭtonomaj regionoj kaj provincoj de la tuta lando kaj vendis milojn da feloj de Sanbej-ŝafidoj. Por kontentigi la bezonon en- kaj ekster-landan, la aŭtonoma regiono dividis la bredejon en kvar partojn de post 1973 kaj


fondis tri novajn semŝafajn bredejojn en Ulanĉab-ligo k. a.

## DILIGENTAJ PAŜTISTOJ

Printempo estas sezono de naskado por ŝafoj de la Sanbej-semŝafa Bredejo de Juegintan. Ĉar oni devas samtempe klasifiki kaj senfeligi ŝafidojn kaj elekti semŝafojn en 24 aŭ maksimume 72 horoj post ilia naskiĝo, tial printempo estas sezono de plej streĉa laborado en la tuta jaro, kaj ĝi ankaŭ estas periodo de ĝojplenaj tagoj. Ĉiufoje, kiam la paŝtistoj akiras superklasajn kaj unuaklasajn ŝafidojn, ili sentas ĝojon kiel kamparanoj gajnintaj riĉan rikolton. Ili scias, ke unu norma semŝafo povas generi grandan nombron da Sanbej-ŝafoj kaj ebligi produkton de multaj valoregaj feloj de Sanbej-ŝafidoj. Tial la paŝtistoj ĉiam klopodas liveri al la ŝtato pli multe da semŝafoj. En iu nokto de la lasta printempo, la ok ŝafinoj zorgataj de He Jukiang naskis 15 ŝafidojn. Li portis paron da unuaklasaj ŝafidoj al la teknikisto por determino. Konsiderante ke samtempa mamnutrado al du ŝafidoj malutilas al la korpo de la ŝafino, la lasta decidis buĉi unu el ili. He petis restigi ambaŭ kaj kulturi ilin en semŝafojn. Por multe kulturi semŝafojn por la ŝtato, ĉiujare li bredis parojn de ŝafidoj, kvankam multajn malfacilojn li devis venki en la bredado de ili. Por havigi al ŝafidoj pli multe da lakto, li prenis kaprinojn kiel mamnutrantojn de la bonrasaj ŝafidoj. Kiam la ŝafidoj estas maturaj, li eliras frue kaj revenas malfrue por longigi la paŝtadon. Li donas al ili furaĝon en malgranda kvanto, sed plurfoje ĉiutage, malgraŭ ke tio plipezigas lian laboron, kaj dank' al tio ne nur la ŝafoj grasiĝas, sed ankaŭ kvanto da furaĝo estas ŝparita. La ŝafoj bredataj de li estas sanaj kaj grasaj kaj la ŝafidoj estas grandaj kaj pezaj. En la pasinta jaro 35.5 pocentoj de la ŝafidoj sub lia zorgo estis superklasaj aŭ unuaklasaj.

Dum nia vizito ni vidis ke ankaŭ la ŝafaroj de aliaj brutobredaj punktoj estas tre bonaj. Respondeculoj de la bredejo diris al ni, ke 33.4% de la ŝafidoj de la tuta bredejo estis superklasaj aŭ unuaklasaj kaj per tio nova rekordo de la bredejo estis starigita.

Kiam ni iris rigardi la speciale flegatan gregon en la okcidento de la bredejo, grupo da virŝafoj bovidgrandaj kun longaj leonaj



*Paŝtado*

kolharoj kuris al ni renkonte. Paŝtistoj diris al ni fiere: "En la pasinta jaro ili ankoraŭ estis ŝafidoj, tamen baldaŭ ili jam estos senditaj el la bredejo por generado."

La speciala flegado al grego estas komencita antaŭ du jaroj, kaj ĝi estas efika metodo por akceli kulturadon de semŝafoj. La laborantoj paŝtas parton de la unuaklasaj ŝafidoj kune kun la ŝafinoj, multigas la fojojn de mamsuĉigo kaj aldonas al ili kvanton da furaĝo. Post demamigo, la ŝafinoj estas resenditaj al la origina grego kaj la ŝafidoj estas aparte bredataj kun aldona nutraĵo. Rimarkinda sukceso estas atingita dank' al apliko de tiu metodo. La 11-monataj virŝafidoj de la speciale flegata grego pezas meznombre po 53 kg., dum ordinaraj virŝafidoj pezas nur po 34.2 kg. La vidita speciale flegata grego enhavas 56 virŝafojn.

## BUNTAJ ŜAFIDFELOJ

Antaŭ la administrejo de la bredejo, junulo Harbala ĉiutage sunumas atenteme ŝafidfelojn. En la pasinta jaro li estis elektita kiel avangarda laboranto de la bredejo. En la komenco li ne tre volontis plenumi tiun laboron. Sed poste kiam li konis, ke la konstruado kaj internacia komerco de la patrolando tion bezonas, li ekmastris la teknikon en mallonga tempo venkinte malfacilojn. La sunumataj ŝafidfeloj etenditaj kaj fiksitaj de li sur tabuloj estas maldikaj, puraj kaj plaĉaj al la okuloj pro sia neta kaj bela formo, eĉ la partoj de orelo kaj kruro estas tute ebenaj. Li scias, ke prilaborantoj de felo povas kunkudri orelfelojn en formon de lotusfloro kaj krurfelojn en desegnon de strioj.

La ŝafidfela tenejo de Harbala prezentas kolekton de buntaj ŝafidfelaj specimenoj. Tre variaj estas la bukloj de la valoregaj ŝafidfeloj, iuj similas al silkraŭpoj, aliaj similas al faboj kaj triaj alprenas al si formon de ringo aŭ duonringo. Palpante ilin oni sentas ke ili estas elastaj kaj glataj kiel silka ŝtofo. Iuj ŝafidfeloj surhavas belegan desegnon de ondoj, de ringaj ondoj sur akvosurfaco trafita de ŝtono aŭ de glacio sur fenestrovitro en vintro.

La ŝafidfeloj estas nigraj, brunaj aŭ grizaj kun variaj nuancoj. Ankoraŭ pli valoraj estas la ŝafidfeloj kun oraj aŭ arĝentaj bukloj, kies harradiko estas en malhela koloro dum la harpinto en hela koloro. Tiuj feloj kun oraj aŭ arĝente grizaj harpintoj tre plaĉas al la okuloj per sia brila koloro. La bredejo komencis kulturi kolorajn ŝafidojn en 1966 kaj nun jam posedas pli ol 200 kapojn.

## NOVA SUKCESO DE SCIENCA BREDADO

En la nordorienta parto de la bredejo troviĝas ŝafaro nove formita en la pasinta jaro, kiun oni nomas transplanta grego. Kiam ni venis al la loko, la ŝafidoj estis mamsuĉantaj. Alproksimiĝinte al ili, ni trovis, ke la ŝafinoj estas de indiĝena specio, dum la ŝafidoj estas de la pura Sanbej-raso. Tio tre mirigis kaj interesis nin. Teknikisto diris al ni: "Jen estas rezulto de prunto de utero, t.e. transmeti fekundigitan ovolon de Sanbej-ŝafino en la uteron de indiĝena ŝafino, por ke la lasta nasku Sanbej-ŝafidon." Tiu metodo estas frukto de esplorado de laborantoj de la bredejo kaj la Genetika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj en 1973. Ili injektis medikamenton al bonrasa ŝafino por ke ŝi produktu pli multe da ovoloj kaj poste ilin fekundigi per bonrasaj spermatozooj kaj transmetis la fekundigitajn ovolojn en ovodukton de 4 aŭ 5 indiĝenaj ŝafinoj. Dank' al tiu aranĝo, oni povas akiri de unu bonrasa ŝafino pli ol 6 bonrasajn ŝafidojn en ĉiu naskosezono. Nun 6 paŝtistoj kaj veterinaroj partoprenas en la esplorado kaj ili faras preparon por disvastigi tiun metodon. Tiu sukceso malfermis bonan vojon por rapidigi la bonigadon de la dombestoj de nia lando.



LUO CAŬ:

# Novtipa laborista universitato en progreso


EN la Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio aperis multaj novaj aferoj, inter kiuj troviĝas laborista universitato de la 21-a de julio. Se vi eniras en la pordegon de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko, vi tuj rimarkas en la dekstra flanko de la bulvardo kondukanta al la laborejoj okulfrapan titoltabulon kun la nomo Laborista Universitato de la 21-a de Julio de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko.

## KULTURI LABORISTOJN EN VERAJN MASTROJN DE TEKNIKO

Ĉi tie estas kaj fabriko kaj universitato. La universitato estas starigita de la fabriko. Ĉu fabriko bezonas kaj povas funkciigi universitaton? En la komenco ne ĉiuj havis klaran ideon pri tio. Sed la ŝanĝoj okazintaj al la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko forigis la dubojn de la skeptikuloj.




*La Laborista Universitato de la 21-a de Julio de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko*



*Lekciado pri projektado lige kun produktaĵo*

La nomita fabriko estas granda entrepreno produktanta precizajn frotumajn ilmaŝinojn. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, pro malhelpo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, okazis jena afero: La fabriko estis postulata fabriki ian grandan frotuman ilmaŝinon urĝe bezonatan en produktado. Kunveno estis okazigita en la fabriko por diskuti, ĉu akcepti la taskon aŭ ne. Iuj opiniis, ke la tasko estas plenumebla kun klopodado laŭ la ekzistantaj kondiĉoj kaj proponis ĝin akcepti. Sed la malmultaj gvidantaj teknikistoj diris, ke la fabriko ne havas necesajn kondiĉojn por fari tion kaj rifuzis la taskon. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, multaj teknikistoj devenintaj de laboristoj, revoluciaj junaj teknikistoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj fariĝis mastroj en scienca esplorado kaj teknika projektado. Kaj la dirita granda frotuma ilmaŝino ja estis sukcese fabrikita antaŭ kelkaj jaroj, kiam la kondiĉoj de la fabriko ankoraŭ ne multe ŝanĝiĝis.

La junaj teknikistoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko devenis aŭ de altlernejaj diplomitoj aŭ de laboristoj. Praktiko montris, ke la lastaj akumulis riĉan sperton dum longa praktika laboro, povas fari sciencan esploron kaj memstare fari projektadon, post kelkjara studo en postlabora teknika lernejo. El la pli ol 100 novaj produktaĵoj fabrikitaj en la lastaj 7 jaroj pli ol 60 estis projektitaj ĉefe de laboristodevenaj teknikistoj. Kaj inter ili troviĝas altpreciza grandtipa frotuma ilmaŝino por lagroj olemembranaj, aŭtomata dufina frotuma ilmaŝino kaj aliaj altnivelaj produktaĵoj.

La sperto de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko pruvis, ke la lernejoj nepre devas elkulturi **"laborulojn kun socialisma konscio kaj kultura scio"**. La lerneja edukado nepre devas esti kombinita kun produkta laboro. Forta vivipovo estas montrita de la socialisma nova afero de kulturado de laboristoj en teknikajn laborantojn. La laborista klaso ne nur rompis la katenon ĉirkaŭ sia kolo, sed

ankaŭ fariĝis mastro de tekniko. Nun pli ol 60 pocentoj de ĝiaj teknikaj laborantoj devenis de laboristoj.

Prezidanto Maŭ Zedong konfirmis la vojon de kulturado de teknikaj laborantoj el laboristoj trovitan de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko. En la 21-a de julio de 1968 li montris penetrive: **". . . Revolucio devas esti farita en edukado, proleta politiko devas esti metata en komandon kaj la vojo irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en trejnado de teknikaj laborantoj el la laboristoj devas esti prenata. Studentoj devas esti elektitaj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produkta praktiko post kelkjara studo en lernejo."**


La instrukcio de Prezidanto Maŭ rapide plenumiĝis tra la tuta lando, kaj la praktiko en la pasintaj 7 jaroj pruvis, ke la novtipaj laboristaj universitatoj jam akiris grandajn sukcesojn en la tuta lando. Tiaj universitatoj fonditaj laŭ la instrukcio estas nun nomataj "laboristaj universitatoj de la 21-a de julio" por memorigi la daton en kiu la instrukcio de Prezidanto Maŭ estis farita. Tiaj universitatoj povas esti fonditaj ne nur de grandaj fabrikoj sed ankaŭ de malgrandaj; iliaj studobjektoj povas esti teknologio, medicino aŭ sociaj sciencoj; ilia studtempo povas esti tuttaga, duontaga aŭ postlabora, kaj ĉefe postlabora; ilia studperiodo estas aŭ longa aŭ mallonga. La laboristaj universitatoj pli kaj pli multiĝis kaj boniĝis. Nun en la laboristaj universitatoj diversformaj de nia lando studas pli ol 100,000 laboristoj. La diplomitoj de tiuj universitatoj fariĝis plejparte aktivuloj en lernado de politiko kaj laboro post reveno al sia laborposteno.

## FONDO DE LABORISTA UNIVERSITATO LAŬ BEZONO

La laboristaj universitatoj estas tute novtipaj. Ĝiaj studobjektoj estas difinitaj laŭ la bezonoj de la koncernaj fabrikoj kaj minejoj. La studentoj estas eminentaj laboristoj el la produkta fronto. Ili prenas la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado kiel klasĉambron. Ili lernas ne nur fakajn teoriojn kaj teknikojn sed ankaŭ Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson. Ili kaj lernas kaj laboras kaj solvadas problemojn en produktado per akiritaj fakaj scioj, ludante aktivan rolon en revolucio kaj produktado.

En tiuj universitatoj instruas ĉefe laboristoj kun riĉa praktika sperto kaj ankaŭ teknikistoj kaj ordinaraj universitataj instruistoj. La instruaj materialoj estas kune verkitaj de teknikistoj-laboristoj, instruistoj kaj lernantoj, kiuj resumis sperton en produktado, kaj plibonigitaj dank' al reviziado kaj kompletigado laŭ proponoj de laboristoj. Tiaj materialoj kun resumita sperto de fabrikoj kaj teknikaj eltrovaĵoj kaj taŭgas por praktika celo kaj spegulas progresintan nivelon de sciencoj kaj tekniko.

*La elektra ĉaro farita de Vang Cajcaj kaj aliaj laboristoj*




Krom politika kurso de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, en la Laborista Universitato de la 21-a de Julio de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko estas instruataj teknika desegnado, matematiko, meĥaniko, hidraŭliko, elektro, projektado kaj fabrikado de frotuma ilmaŝino kaj fremdaj lingvoj. La lernoperiodo estas trijara kaj la lernotempo estas tuttaga. La instruado de la universitato ĉiam estas farata laŭ la principo de interligo de teorio kun praktiko kaj scioj estas instruataj en ligo kun tipaj produktaĵoj kaj laŭ la karakterizaĵoj de la lernantoj.

La laboristan universitaton povas starigi ne nur granda fabriko, sed ankaŭ malgranda. Ni prenu la Ŝanhajan Popolan Radioaparatan Fabrikon kiel ekzemplon. Ĝi estis antaŭe malgranda fabriko de ludiloj kaj komencis fabriki televidilojn en 1970. Nun ĝi havas nur pli ol 500 personojn, el kiuj duono estas virinoj, kies klereco estis malalta. Post la ŝanĝo de la produkta tasko, la teknikaj fortoj de la fabriko montriĝis ankoraŭ pli multe sub la bezono. En 1972 ĝi fondis laboristan universitaton de la 21-a de julio, kies lernoperiodo estas 1 jaro kaj duono kaj ĝiaj lernantoj studas en postlaboraj horoj. Elektroniko, maŝinfarado k. a. studobjektoj estis instruataj en ĝi. Post klopodado en kelkaj jaroj, pli ol 60 teknikaj laborantoj estas kulturitaj el laboristoj. Veterana laboristino Caj Juemej havis klerecon nur de elementa lernanto. Dank' al sia diligenta studo ŝi jam diplomitiĝis el la universitato. Nun ŝi jam povas lerte uzi komplikajn instrumentojn kaj mastri la teknikon de reguligado de televidilo. Sekve de la rapida kreskado de teknikistoj kiel Caj Juemej, la kvalito de la televidiloj produktitaj de la fabriko altiĝis konsiderinde kaj la monata produktokvanto multe grandiĝis kaj la produktokosto malaltiĝis je 40 pocentoj.

## POST REVENO AL SIA LABORPOSTENO

Reveninte al la praktika produktado, la diplomitoj el la laboristaj universitatoj de la 21-a de julio partoprenas kaj en fizika laboro kaj en teknika renovigo. Ili estas kaj laboristo kaj teknikisto kaj estas varme akceptataj de la laboristaj amasoj. Arganistino Vang Cajcaj, unu el la unuaj diplomitoj de la laborista universitato, petis por si la taskon de reformo de puŝĉaro post reveno al sia laborgrupo, ĉar ŝi mem havis sperton pri tia peza korpa laboro. Ŝi mem faris projektan desegnadon,

*Lekciado en la Laborista Universitato de la Ŝanhaja Popola Radioaparata Fabriko*



*Veterana laboristino Caj Juemej en laboro*



prilaboris maŝinpecojn kune kun aliaj kaj partoprenis en la tuta procedo de la reformado. Post sukcesa produkto de la unua elektra ĉaro, laboristoj ame laŭdis ŝin: "Jen nia propra studentino."

La malnovaj altlernejoj antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio prenis librajn sciojn kiel la unikan kriterion pri la nivelo de la studentoj, kiuj studis 5-6 jarojn en la lernejoj tute aparte de produktado. En la pasinteco, tiu fabriko intencis fabriki ciferregatan frotuman ilmaŝinon. Kelkaj teknikistoj faris projektadon en oficejo laŭ studita literaturo sen serioza konsultado al laboristoj. Ili provadis multajn jarojn, sed ne sukcesis.

La unua ciferregata kamkurba frotuma ilmaŝino de Ĉinio estis finfine sukcese projektita kaj fabrikita antaŭ nelonge dank' al partopreno de laboristoj-studentoj. Diplomite el laborista universitato, antaŭa stablolaboristo Ŝen Guansong prenis sur sin la taskon de projektado de la elektraj partoj de la frotuma ilmaŝino. Per sia sperto kaj lernita teknika teorio kaj dank' al kolektiva saĝo de la laboristoj li fine sukcesis elfari ciferregan ekipaĵon post unujara penlaborado.

Unu ei la unuaj diplomitoj de la laborista universitato Vu Jongĝang 8-foje ŝanĝis sian laborpostenon laŭ la bezono kaj tre bone plenumis la asignitajn laborojn de projektado, tornado, frezado, fajlado kaj frotumado. Li estis kromnomata "universala majstro" pro sia lerteco.

La universitatoj funkciigataj de fabrikoj grandnombre elkulturas teknikajn laborantojn por plenumi la bezonon de la disvolvado de la ĉina socialisma ekonomio. La kreskado de la vicaro de tiaj laboristaj intelektuloj ludos sian rolon en reduktado de la diferencoj inter la intelektaj kaj fizikaj laboroj kaj havas profundan signifon por la firmigo kaj disvolviĝo de la socialisma sistemo de la nova Ĉinio.


# Nova floro de kombiniĝo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj

de ĴEN MING

EN kurso pri kuracado de artika lezo per sinteza terapio de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en Pekino lekcias junulo. Li estas kamarado Feng Tianjoŭ, kompartiano kaj kuracisto de aerarmea trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li lekcias demonstrante kaj detale parolante pri tipaj kazoj. Lia instruado altiras atenton de ĉiuj ĉeestantoj. Li formis novan diagnozan metodon kaj terapion pri lezo de artiko kombinante avantaĝojn de la ĉina kaj okcidenta medicinoj koncerne al tio, kaj formis novan teorion. Tiu ĉi nova ostoreĝustiga terapio estas nova floro de kombiniĝo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj sub la direktado de la revolucia higiena linio de Prezidanto Maŭ.

## NOVA STARTPUNKTO

Diplomite el la armea medicina universitato en 1967, Feng Tianjoŭ fariĝis kuracisto de aerarmea trupo. Vivante inter la



*Feng Tianjoŭ*

viglaj pilotoj, li sentis grandan ĝojon. Sed li ĉagreniĝis, kiam iu el la pilotoj aŭ maŝinflegistoj suferis doloron en la lumbo aŭ gambo kaj ne povis labori. Kontraŭ tia malsano li ne havis rimedon. Medikamentoj, akupunkturo, kaŭterizo kaj plastro povas nur mildigi la doloron portempe, sed ne ĝin elimini. Kion fari? Li pensis pri sia devo de popola armea kuracisto kaj decidis kun arda koro klopodi ĉiamaniere por trovi novan terapion kontraŭ doloro de lumbo kaj gambo.

Iutage en 1969, la talio de iu piloto estis tordlezita kaj post duonmonata kuracado en hospitalo li ankoraŭ iradis kun klinita kaj flankenturnita trunko kaj suferis grandan doloron. Oni diris, ke en Pekino troviĝas kuracistino de tradicia medicino, kiu povas forigi doloron en lumbo per kelkfoja masaĝo. La paciento do sin turnis al ŝi por helpo.

Feng Tianjoŭ vizitis la kuracistinon kune kun la piloto kaj atente observadis starante apude por vidi, kiel ŝi kuracas. La preskaŭ 70-jara avino faris demandojn al la paciento pri lia malsano kaj poste komencis masaĝi lerte. Nemalmultaj pacientoj eniris ŝian ĉambron kun kurba talio kaj eliris kun korpo rektigita. Ŝi sidigis la piloton sur benko, kaj post ioma masaĝo rektigis lian talion kiu restis kurba dum monato. Feng Tianjoŭ ne povis tuj kapti la ŝlosilon de la terapio, tamen li klare vidis la fakton ke la avino sukcese kuracis la piloton.

La avino-kuracistino praktikas ostomasaĝon de la ĉina medicino.

Feng Tianjoŭ prezentis kun arda koro petskribon al la partia komitato por akiri permeson lernadi de la kuracistino la metodon de la ĉina medicino por kuraci doloron en lumbo kaj gambo. Informiĝinte pri tio, iuj diris: "Ĉu oni povas ion ellerni de maljunulino analfabeta?" "Ĉu malsano nekuracebla en granda hospitalo povas esti kuracita en kuracejo malgranda?" Malgraŭ la obstaklo de rutinismo, Feng Tianjoŭ venis al Pekino sub varmaj subteno kaj helpo de la partia organizo kaj vastaj amasoj kaj diligente lernadis de la kuracistino duonjaron. Tio estis nova startpunkto por Feng Tianjoŭ sur la vojo de kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj.

## ESPLORADO DE LA SEKRETO

Tiea medio por lernado kaj laboro estis malfacila. Iuj el la lernantoj ĉesis lerni plendante ke la avino ne povas science ekspliki sian kuracmetodon. Kvankam Feng Tianjoŭ same trovis, ke la maljunulino ne povas doni sciencan klarigon, tamen li firme kredas, ke la riĉa sperto de kuracado akirita de la ĉina popolo en miloj da jaroj certe entenas objektan veron. Li rimarkis tion, ke la pacientoj povas ricevi efikan kuracadon paginte nur 10 fen-ojn (= 0.1 juano). Foje venis de malproksime al Pekino juna paciento, kiu ne povis movi siajn gambojn kaj regi sian urinadon kaj fekadon pro lezo je la spino. La maljunulino masaĝis lin malpli ol dek minutojn kaj la junulo jam povis iri el la kuracejo subtenate de alia. La familiano de la paciento kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj ankaŭ Feng Tianjoŭ estis forte kortuŝita. Li vidis, ke tiu terapio estas malmultekosta kaj rapide efikanta kaj decidis ĝin ellerni por kuraci pacientojn el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

De tiam Feng Tianjoŭ lernis ankoraŭ pli modeste de la kuracistino kaj faris studon, analizon, komparon kaj spertoresumadon pri la terapio, aplikante siajn lernitajn sciojn de moderna medicino kaj klinikan sperton. La malsano de elstariĝo de lumba intervertebra disko estas ordinara kaj ripetiĝema malsano, kiu kaŭzas iskiatalgion kaj doloron en lumbo kaj gambo pro premo de elstariĝinta intervertebra disko al la nervoj. Tiun malsanon ofte suferas precipe junaj kaj mezaĝaj fizikaj laboruloj. En la lastaj jaroj, oni aplikis masaĝon, tiradon, operacion kaj aliajn metodojn por ĝin kuraci en nia lando, kaj senĉese bonigadas la metodon, sed la kuracperiodo estas longa kaj nemalmultaj resanigitoj ofte refalis en la antaŭan suferon. La kuracistino akumulis sperton de multaj jaroj pri ostoreĝustiga terapio de ĉina medicino kaj aparte lertas en diagnozo kaj kuracado de doloro en lumbo kaj gambo. Ŝi opinias, ke oni povas determini anormalan lokiĝon de spinproceso per palpado de la lumba spino kaj ĝustigo de spinproceso povas mildigi aŭ forigi la doloron de la pacientoj.

Feng Tianjoŭ diligente lernis kun modesteco kaj rapide posedis la arton de ĝustigo de anormala lokiĝo de spin-proceso, kiu estas la ŝlosilo por kuraci elstariĝon de lumba intervertebra disko. El tio li vidis, ke la malsanoj de lumba spino estas ligitaj kun anormala lokiĝo de spin-proceso. Li studis pliapaŝe la karakterizaĵojn de multaj masaĝaj manieroj de la ĉina medicino por kuraci elstariĝon de lumba intervertebra disko kaj la ekvilibron de la spino. Kaj laŭ la principo de tenado de la ekvilibro de la spino, li ŝanĝis la antaŭan kuracmetodon, tiel ke ĝi fariĝis pli scienca kaj pli efika kaj la procento de remalsaniĝo estis malgrandigita. Tiamaniere Feng Tianjoŭ disvolvis la masaĝan manieron por kuraci elstariĝon de lumba intervertebra disko kaj li liberigis multajn pacientojn de sufero de tiu malsano nur per siaj ambaŭ manoj.



*Feng Tianjoŭ studas pri malsana kazo kun siaj kolegoj.*

Surbaze de sia praktikado, Feng Tianjoŭ verkis valoran disertacion. En tiu verko li prezentis novan metodon por diagnozi kaj kuraci elstariĝon de lumba intervertebra disko aplikante la ĉinan kaj okcidentan medicinon en kombino. Li ankaŭ donis jenan vivecan ekzemplon en la artikolo: Juna piloto Ĝaŭ Minggi tordlezis sian lumbon en sporta ekzerco. Hospitalo diagnozis, ke li suferas de elstariĝo de lumba intervertebra disko, kaj provis lin kuraci per tirado, blokada terapio, fizika terapio k. s. en pli ol du monatoj sen sukceso. La paciento iris tre malfacile kaj eble li devos ĉesi flugi, se tiu stato daŭros. Kia malfeliĉo estas "ĉesi flugi" por piloto kiu amas sian okupon. Kiam Ĝaŭ Minggi estis en maltrankvilo kaj ĉagreno, Feng Tianjoŭ resanigis lin per sia nova ostoreĝustiga terapio kaj post reveno al sia trupo Ĝaŭ denove flugis en la bluan aeron de la patrolando, stirante batalan aglon.

## STREBO AL PLIBONIGO

En la lastaj jaroj, Feng Tianjoŭ sukcese kuracis multajn malsanulojn en vilaĝoj, fabrikoj, ŝtataj institucioj, armeaj trupoj kaj lernejoj per la nova ostoreĝustiga terapio kaj akumulis riĉan sperton. Pacientoj de ŝultra periartrito denove povis levi sian brakon, mildiĝis aŭ malaperis la doloro multjara en kolo, ŝultro aŭ brako kaj suferantoj de doloro en lumbo kaj gambo formetis siajn lambastonojn kaj reiris al sia laborposteno. Surbaze de sia praktikado, Feng Tianjoŭ resumis sian sperton, verkis «Kurson pri Nova Ostoreĝustiga Terapio» kaj elkulturis pli ol 200 kuracistojn de tiu terapio.

Ĉiu ajn nova afero devas trairi zigzagan vojon en sia kreskado. Kiam aperis la ĝermo de la nova terapio, Feng Tianjoŭ aŭdis kritikojn kaj mokojn kiel "vi deziras famiĝi", "vi ĉasas gloron".

Prezidanto Maŭ diris: **"En historio novaj kaj ĝustaj aferoj ofte ne ricevis la agnoskon de la plimulto de homoj en la komenco kaj devis disvolviĝi zigzage tra batalado."** Tiu instruo de Prezidanto Maŭ Zedong plifirmigis la paŝojn de Feng Tianjoŭ en irado de la vojo de kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj. Li diligente lernis kuracarton, legis grandan kvanton da medicina literaturo de la patrolando kaj modernaj medicinaj verkoj en postlaboraj horoj kaj klopodis resumi sian praktikan sperton per modernaj sciencaj scioj. Li aktive lernis de spertuloj, vizitis multajn ostokuracistojn en la lastaj jaroj kaj dank' al tio riĉigis sian sperton kaj altigis sian konon. Nun li jam atingis certan sukceson en kuracado kaj esploro pri hiperosto, megalospinito kaj kolvertebra malsano laŭ la principo de tenado de ekvilibro de la vertebroj. Sed en kuracado de lezita kartilago li trovis ke al iuj kazoj la terapio ne efikis kaj al aliaj kazoj reaperis la simptomoj nelonge post resaniĝo. Tiujn problemojn oni devas konadi tra praktiko kaj solvi iom post iom.

En la kurso pri kuracado de artika lezo per sinteza terapio de la ĉina kaj okcidenta medicinoj li instruis per sugestoj kaj lernis de kuracistoj el diversaj lokoj de la lando tra diskutado dum leciono. Lastatempe li kaj aliaj instruistoj kaj lernantoj de la kurso sukcesis kuraci pacienton kies tria kaj kvara kolaj vertebroj duonelartikiĝis pro traŭmato al la kapo. Antaŭe kuracistoj de iu granda hospitalo diagnozis, ke la paciento suferis de "sinteza malsano pro traŭmato al la cerbo" kaj "neŭrozo". Kiam la paciento staris, aperis ĉe li simptomo de premo al la supra parto de spinaj nervoj, lia korpo estis rigida kaj li ne povis paŝi. La kuracistoj detale demandis la pacienton pri la historio de lia malsano, atente ekzamenis lin, kolektive diskutis la kazon kaj faris diagnozon. Ili reĝustigis la trian kaj kvaran vertebrojn per lerta malpeza manipulo kaj la paciento tuj sentis mildiĝon de la sufero kaj en la tria tago jam povis libere iri.

Nun la lernantoj de la kurso jam akiris unuapaŝan sukceson en aplikado de la nova teorio kaj nova terapio de Feng Tianjoŭ kaj sukcese kuracis pacientojn.

# Junulino Ĉen Ĉuanhiang batmortigis leopardon

JUNULINO Ĉen Ĉuanhiang de Kiangin-brigado de Panlong-komunumo, en arbara regiono Ŝennonggia de Hubej-provinco, batmortigis leopardon longan je pli ol sep futoj per senarmaj manoj kaj savis sian klasan fratinon el la faŭko de la feroca besto.

Kiel ŝi mortigis la leopardon?

## I

En marta Ŝennonggia ĉie belas floroj kaj vidiĝas viveco. En la 29-a, Ĉen Ĉuanhiang kaj aliaj komunumanoj faris selektadon en kelo de terpomoj post domo. "Be, be. . .", subite el montvalo alflugis terura bleko de eta ŝafo kaj aŭdiĝis ies krio: "Hu, leopardo!" En la krio la komunumanoj eklevis sian kapon kaj vidis ke leopardo persekutas ŝafidon. Tiutempe 20-jara Ĉen Ĉuanhiang kaptis bovlograndan ŝtonpecon kaj ĝin ĵetis al la leopardo, kies buŝo estis trafita de la ŝtono. Tio incitis la beston. Forlasinte la ŝafidon, ĝi kun levitaj kapo kaj vosto sin ĵetis al la homoj muĝante. Ĉen Ĉuanhiang subite trovis ke infano de malpli ol 3 jaroj de komunumanino Ke Ĝeng-ju dormas surtere, ŝi do sturmis antaŭen renkonte al la leopardo kaj ŝirmis la infanon per sia korpo. La leopardo alte pretersaltis Ĉen Ĉuanhiang, rekte al Ke Ĝeng-ju kaj faligis ŝin teren. Ĝi premis per la du antaŭaj piedoj ŝiajn dekstran bruston kaj la maldekstran brakon kaj malfermis la faŭkon al ŝia kapo. En tiu kriza momento Ĉen Ĉuanhiang pensis en si ke kiel baza milicianino ŝi nepre devas ekstermi la ferocan beston por elsavi la klasan fratinon, same kiel ĈPLA-anoj ekstermis malamikojn sur militejo, eĉ se en tio ŝi devos oferi sian vivon. Ŝi do faris sagrapidan paŝon kaj flugan salton kaj jam rajdis sur la dorso de la leopardo. Ŝi kaptis ĝiajn orelon kaj makzelon per la maldekstra mano, premis ĝian kapon per la alia kaj turnis ĝin maldekstren. Ke Ĝeng-ju elsaviĝis, tamen la leopardo furioziĝis. Ĝi ellasis varman fetoran spiraĵon, kolere muĝadis, kaj intencis forskui Ĉen Ĉuanhiang de sur sia dorso, draste frapante ŝian dorson per la vosto kvazaŭ per vipo kaj forte saltante plurfoje. Sed Ĉen Ĉuanhiang firme tenis ĝian kapon per la manoj, ŝiaj gamboj forte kroĉiĝis al ĝia ventro kaj ŝiaj piedoj kvazaŭ fiksiĝis sur la tero. La leopardo ĉiamaniere sin movis antaŭen, kaj pro tio restigis per ungegoj sur la tero du sulkojn longajn je pli ol 4 futoj. Tiutempe Ĉen Ĉuanhiang subite rememoris la diron de sia patro, ke leopardo havas kupran kapon, feran voston sed pajlan talion, ŝi do ekbatis la dorson de la leopardo per sia postaĵo, ambaŭmane kaptante ĝian kapon. Je la tria bato aŭdiĝis "krak" kaj rompiĝis la spino de la leopardo. La leopardo tuj falis teren, malfermis la buŝegon, kiu ellasis ŝaŭmon kaj sangon, la vosto jam ne povis leviĝi kaj svingetiĝis kiel balailo. La leopardo senfortiĝis . . .

## II

La afero pri brava mortigo de leopardo fare de Ĉen Ĉuanhiang mirigis multajn homojn. Iuj demandis per letero: "Ĉu Ĉen Ĉuanhiang posedas bonan luktarton kiel la tigromortiganto Vu Song en antikveco aŭ estas atleto kun fortika korpo? Se ne, kiel

ŝi kuraĝis lukti kun leopardo?" Pri tio la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Kiangin-brigado respondis: "Ĉen Ĉuanhiang nek havas altan luktarton nek estas atleto. Ŝi kuraĝis lukti kun la leopardo nur dank' al la armado de Marksismo-Leninismo kaj Maŭzedongpenso."

Kiam Ĉen Ĉuanhiang estis 17-jara, ŝi milicianiĝis. De tiam ŝi diligente lernis legoscion kaj studis revolucian teorion. En sia infaneco ŝi jam ekŝatis rakontojn pri la perforta transpaso de la 17 bravuloj de la Ruĝa Armeo trans la riveron Dadu, sinofero de Dong Cunĵuj en eksplodigo de fortikaĵo de malamikoj kaj ŝtopado de paftruo de malamikoj fare de Huang Giguang per sia korpo. Ŝi decidis esti homo utila al la popolo.

En sia produkta taĉmento ŝi ĉiam fervore helpas aliajn. Komunumanino Vu Hjuĉun ne scipovas kudradon, Ĉen Ĉuanhiang kaj ŝia patrino do helpas ŝin en tio. Kiam ŝi aŭdis ke infano de iu komunumano malsaniĝis, ŝi tuj iris senprokraste en nokto malproksimen por venigi kuraciston kaj iris en montojn por kolekti drogherbojn por kuraci la infanon. Ofte, sur vojo al kamplaboro aŭ post laboro ŝi portas agrikulturilojn por aĝuloj. La

*Ĉen Ĉuanhiang rakontas al milicianoj kaj ĈPLA-anoj kiel ŝi batmortigis la leopardon.*



komunumanoj diris, ke ŝiaj bonfaroj estas sennombraj kiel ruĝaj rododendroj sur montoj.

Kiangin-brigado situas profunde en montoj kovrataj de densaj arbaroj en kiuj vivas aproj, ursoj, tigroj kaj leopardoj, kaj tiuj minacas la loĝantojn kaj brutojn. La plugbovoj de la brigado paŝtiĝas sur monto kaj eble povas esti damaĝita de la rabobestoj post vesperiĝo. En tia tempo Ĉen Ĉuanhiang ĉiam iniciate iris sur monton por revenigi ilin. Iuj maltrankvile malkonsilis ŝin: "Ĉuanhiang, vi estas knabino, kaj tio estas tro riska!" Aŭdinte tion, ŝi ĉiam respondis sentime: "Ĉu mi povas domaĝi mian vivon se la interesoj de la kolektivo estas atencitaj?" Iufoje, bovino de la brigado kuris en arbaron kaj ne revenis ĝis profunda nokto. Informite pri tio, Ĉen Ĉuanhiang tuj iris serĉi kune kun bredisto, tenante torĉojn. Ili trairis kelkajn arbarojn sur montoj, kaj fine trovis la bovinon en iu profunda valo.

Post kiam la heroaĵo de Ĉen Ĉuanhiang pri mortigo de leopardo estis vaste cirkuligita, alflugis unu post alia gratulaj leteroj de diversaj lokoj plenaj de admiro. La Revolucia Komitato kaj la gvida organo de la trupoj de Hubej-provinco faris decidon honori Ĉen Ĉuanhiang, membron de la Komunisma Junulara Ligo kaj bazan milicianinon per la titolo "Heroino de Leopardo-mortigo". La rezolucio diras: "Kamaradino Ĉen Ĉuanhiang brave mortigis leopardon riskante sian vivon. Ŝi estas pioniro en la movado de lerno de la teorio pri la diktaturo de la proletaro kaj heroa milicianino elkulturita de Maŭzedongpenso, timanta nek penigon nek morton." La rezolucio alvokas ke la armeanoj kaj popolanoj de la tuta provinco lernu de kamaradino Ĉen Ĉuanhiang la eminentan kvaliton, kritiku la absurdaĵojn distrumpetitajn de Konfucio kaj Lin Biaŭ, ke "viroj estas noblaj dum virinoj plebaj", "virinoj estas senutilaj" k.a., kritiku reviziismon kaj kapitalisman tendencon kaj faru pli grandajn kontribuojn por firmigi la diktaturon de la proletaro.

# Kial la koko ne kokerikas plu?

TIO okazis en Cajle-brigado de Songgiang-gubernio de Ŝanhajo. Antaŭ nelonge, la komandantoj kaj batalantoj de la 1-a kompanio de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Ŝanhajo plenumis taskon en la brigado. Tiam la batalantoj de la 9-a subplotono loĝis ĉe la malriĉkamparanino Avino Ĉen. La pli-ol-80-jara Avino Ĉen tre bone zorgis ilin en vivo kiel siajn infanojn. En pluva tago, kiam la vestoj de la batalantoj estis malsekigitaj, Avino Ĉen hejtis sian fornon por baksekigi la vestojn por ili. Kaj, la batalantoj rigardas ŝin kiel sian propran avinon kaj portis akvon, dishakis brullignon kaj faris aliajn dommastrumajn laborojn por ŝi.

Sed io maltrankviligis la avinon. Ŝi bredis unu grandan semkokon, kiun ŝi ŝategis. Lastatempe la batalantoj de la 9-a subplotono tre laciĝis pro la intensa trejnado en tago. Sed la koko laŭte kokerikadis antaŭ tagiĝo. Pro tio Avino Ĉen forte maltrankviliĝis. Ŝi pensis, ke tio ĝenas la batalantojn en dormo. Avino Ĉen ellitiĝis kaj iris el la ĉambro al la kokejo. Kiam la koko ekkriis, ŝi tuj kaptis ĝin je la kolo. Sed kiam ŝi lasis la kokon, eĉ pli laŭte ĝi kokerikadis pro timo. Sekve de tio ankaŭ la kokinoj ektumultis klukante kaj la batalantoj estis vekitaj el dormo. Pri tio la avino tre bedaŭris. En la sekvanta tago la maljunulino ellitiĝis antaŭ elkrepuskiĝo. Ĉifoje ŝi ŝanĝis sian taktikon. Ŝi unue malfermis la pordon de la kokejo kaj elpelis la kokon el ĝi. Tamen, irinte kelkajn paŝojn la koko denove komencis kokeriki kun etendita kolo. La avino forte koleris, tuj ĝin kaptis kaj reiris kun ĝi en la kuirejon por serĉi tranĉilon. Kiam la avino estis mortigonta la kokon, la subplotonestro Ding Ginfu aperis antaŭ ŝi. "Ne mortigu ĝin, avino," dirante subplotonestro Ding transprenis la tranĉilon. Efektive Ding jam atentis la intencon de la avino mortigi la kokon.

Sed tio ne finiĝis. Tiutempe la batalantoj estis en periodo de intensa trejnado kaj revenis pli malfrue en vespero. Por havigi sufiĉan ripozon al la batalantoj la avino mortigis sian grandan kokon en la tago, kiam ili eliris por trejnado. Tial la batalantoj havis bonan dormon ĝis la tagiĝo sen ĝeno de kokerikado. Informiĝinte ke la avino mortigis la kokon, la batalantoj konfuziĝis kaj ne trovis taŭgajn vortojn por diri al ŝi.

Post plenumo de la tasko la 9-a subplotono formarŝis de Cajle-brigado en nokto. Je la krepuskiĝo subite aŭdiĝis kokokrio en la hejmo de Avino Ĉen. La maljunulino ellitiĝis kaj trovis ke la vazego en la kuirejo estis plena de akvo, la korto pura kaj la ĉambro loĝita de la trupanoj malplena. Sed koko staris apud la tablo kaj paperslipo kuŝis sur ĝi. La noto sur la slipo legiĝis jene: "Ni foriris de vi, Avino Ĉen, dankon al vi pro via zorgado pri ni. Por ni, vi mortigis vian grandan kokon. Jen ni aĉetis kokon por vi, bonvolu akcepti ĝin." Vidinte la slipon kaj la kokon, Avino Ĉen ekmemoris pasintaĵon. Antaŭ la Liberiĝo, foje la edzo de Avino Ĉen renkontis du soldatojn de reakcia trupo de Kuomintango sur la revena vojo de la urbeto al la hejmo. La soldatoj rabis ne nur la aĉetitan ŝtofon kaj monon de ŝia edzo sed ankaŭ lin batis kruele. Memorante la pasintaĵon antaŭ pli ol 20 jaroj kaj rigardante la kokon, Avino Ĉen estis kortuŝita ĝis larmoj. Ŝi tuj ordonis sian filon kaj nepon postkuri la karulojn por redoni la kokon al ili. Sed la trupo jam iris for. Tiam Avino Ĉen rigardis la irdirekton de la batalantoj kaj diris emocie ke ili vere meritas la titolon de popola armeo edukita de Prezidanto Maŭ.

# Liberigo de ĉiuj enkarcerigitaj usonaj-ĉiangkajŝekaj armitaj spionoj

DE oktobro de 1962 ĝis septembro de 1965, la usona-ĉiangkajŝeka kliko senĉese sendis armitajn spionojn por fari ĝenadon kaj subfosadon al niaj apudmaraj regionoj. La garnizonaj trupoj kaj loĝantoj en tiuj regionoj havas altan singardemon, kuraĝe batalis kaj rapide ekstermis kaj kaptis la 43 grupojn da spionoj venintaj de sur maro kaj tra la aero. La granda venko de la batalo de niaj armeo kaj popolo kontraŭ la malamikoj estas peza bato al la krima intrigo de ĝenado kaj subfosado kontraŭ la ĉeftero fare de Ĉiangkajŝek-kliko, elokvente montris la grandan solidarecon de nia popolo kaj la potencon de la proletara diktaturo.

Laŭ la politiko de Prezidanto Maŭ "**kombini punon kun indulgo, kombini punlaboron kun ideologia edukado**", organoj de publika sekureco de Ĉinio faris edukon kaj reformon al la kaptitaj armitaj spionoj kaj membroj de armitaj spionaj ŝipoj. Ekde julio de 1963, estis liberigitaj 4 grupoj da tiaj kaptitoj, kiuj iom riparis sian krimon aŭ pentis pri sia krimo. La restantaj, post edukado kaj reformado, propraokule vidis la grandajn sukcesojn de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado de la patrolando, konfesis sian kontraŭpopolan krimon, akuzis per sia propra travivajo la krimon de Ĉiangkajŝek-kliko, montris en malsamaj gradoj la decidon ŝanĝi sin en bonulon. Tial la jura organo de nia lando decidis liberigi ĉiujn restantajn 95 armitajn spionojn kaj 49 membrojn de armitaj spionaj ŝipoj enkarcerigitajn.

Al ĉiuj liberigitoj estis donita civitaneco kaj laboro estis asignita al ĉiuj laŭ iliaj respektivaj kondiĉoj. Al tiuj, kiuj volas reiri al Tajvan, la ŝtato donas sufiĉan monon por vojaĝkosto kaj pretigas al ili oportunecon. Ĉiuj liberigitoj ricevis novajn vestojn, litaĵojn kaj poŝmonon kaj faris vizitadon al entreprenoj kaj komunumoj por lernado.

En la kunveno de liberigo, la liberigitaj armitaj spionoj kaj membroj de spionaj ŝipoj kun emociiĝo esprimis foje-refoje dankojn al Prezidanto Maŭ, la Kompartio kaj la popola registaro, kiuj edukis, savis ilin kaj donis al ili novan vivon. Ili decidis korekti siajn mispaŝojn, diligente lerni, daŭre reformi sian penson, turni sin en novan homon kaj kontribui al la konstruado de la socialisma patrolando.

Samtempe liberigitaj estis ankaŭ du japanoj Kinro Hisagaj kaj Seijin Tomimura, kaj du sudaj koreoj Mo O Won kaj Lee Ga Dal, membroj de spionaj ŝipoj de la "Informa Oficejo de la Ministerio de Nacia Defendo" de Ĉiangkajŝek-kliko.

Inter Amikoj

# Teknika Ekspozicio de FRG en Pekino

De la 5-a ĝis la 19-a de septembro okazis en Pekino teknika ekspozicio de la Federacia Respubliko de Germanio. Ĝi estas la unua ekspozicio de industria tekniko aranĝita de FRG en Ĉinio post la starigo de diplomatiaj rilatoj inter la du landoj. En la ekspoziciejo kun areo de pli ol 20,000 kvadrataj metroj montriĝis produktaĵoj de la industriaj fakoj de ilmaŝinoj, mekanikaĵoj, fero kaj ŝtalo, aviadiloj, elektro, tekstilado, kemiaĵoj, optikaj instrumentoj kaj veturiloj, liveritaj de pli ol 300 fabrikoj. La eksponataj produktaĵoj estas fruktoj de laboro kaj saĝo de la popolo de la Federacia Respubliko de Germanio. Tiu ampleksa ekspozicio konigis al la ĉinaj vizitantoj la disvolviĝon de la industria tekniko de FRG. Ĝi pliprofundigis la interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj FRG kaj akcelos la disvolviĝon de la komercado inter la du landoj. Dum la ekspona periodo, pli ol 200,000 homoj vizitis la ekspozicion.

Kaj krome teknikistoj de Ĉinio kaj FRG okazigis pli ol cent kunsidojn por interŝanĝi spertojn pri tekniko de mekaniko, elektroniko, kemia industrio, metalurgio kaj malpeza industrio, kio pliigis la interkomprenon kaj amikecon.

La membroj de la ekspozicia laborgrupo vizitis fabrikojn, antaŭurbajn popolajn komunumojn, lernejojn, hospitalojn, pitoreskejojn kaj historiajn lokojn kaj rigardis artajn prezentadojn. Ĉie kien ili iris ili estis bonvenigataj de ĉinaj popolanoj.

*En la Teknika Ekspozicio de FRG*




# Ekspozicio de Aŭstraliaj Pejzaĝaj Pentraĵoj

La nomita ekspozicio okazis en la Nacieca Kultura Palaco de Pekino, de la 2-a ĝis la 17-a de septembro. En la ekspoziciejo montriĝis 83 pentraĵoj. En tiuj verkoj pri la variaj pejzaĝoj de la suda duonsfero oni povas vidi la diligentan laboron de la aŭstralia popolo kaj fragmentojn de la evoluado de la aŭstralia socio.

La verkoj de la komenca periodo de la 18-a jarcento en la ekspozicio estas plejparte akvareloj kaj krajonaj skizoj, karakterizataj de neteco kaj delikateco. Ili temas aŭ pri primitivaj arbaroj en montaro aŭ pri raraj bestoj kiel kanguruo. Ili estas ne nur artaj verkoj sed ankaŭ figuraj notoj pri la naturo, konataj kiel topografiaj pentraĵoj.

Interesaj estas la ekspozataj verkoj de la lasta duono de la 19-a jarcento kaj tiuj antaŭ



*En la ekspoziciejo*

la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento. En la meza periodo de la 19-a jarcento, iom post iom ŝanĝiĝis la tendenco de la pejzaĝaj pentraĵoj de Aŭstralio. Tiam la pentristoj jam povis sufiĉe lerte pentri ebenaĵajn vidaĵojn kun bovaroj kaj ŝafaroj kaj scenojn de la ĉiutaga vivo. En la fino de la 19-a jarcento, rapide kreskis la pentrarto (ĉefe pejzaĝa) de Aŭstralio sekve de la disvolviĝo de ĝia ekonomio. La skolo de Heidelberg aperinta en tiu tempo estis reprezentanto. La ĉefaj personoj de tiu skolo estis Tom Roberts, A. Streeton, C. Conder k.a. Ili celis starigi propran pentroarton de Aŭstralio. Ili ne nur atente pentris naturajn pejzaĝojn specialajn de Aŭstralio sed ankaŭ ofte spegulis la vivon de la diversaj klasoj de tiu lando per homoj en la pejzaĝoj kaj tuŝis certajn sociajn problemojn. Inter la verkoj pri laboro kaj produktado troviĝis malgranda olepentraĵo "Draŝado en Coolmore, Tasmania" de Tom Roberts kaj "Abelbredejo" de Clara Southern. Tiuj verkoj efektive jam transpasis la limon de pejzaĝaj pentraĵoj kaj eniris en la sferon de primoraj pentraĵoj. Ili forte impresas per etoso de aŭstralia lando. La akvarelo "Somero" de Hans Hejsen verkita en 1909 prezentas pejzaĝon de fekunda regiono de Aŭstralio. La bovaro sub altaj eŭkaliptoj en la pentraĵo prezentas specialan pejzaĝon de Aŭstralio.

La pejzaĝaj pentraĵoj efektive ne nur montras naturajn vidaĵojn sed ankaŭ spegulas rekte aŭ nerekte certan socian enhavon. La Ekspozicio de Aŭstraliaj Pejzaĝaj Pentraĵoj vidigis al la ĉinaj vizitantoj ĝeneralan aspekton de la vivo de la aŭstralia popolo. Ĝi faris kontribuon al profundigo de interkompreno kaj amikeco inter la ĉina kaj aŭstralia popoloj.

# La Nacia Junula Orkestro de Novzelando en Pekino

Malgraŭ laciga transoceana vojaĝo, la Nacia Junula Orkestro de Novzelando venis al Ĉinio por prezentado. Ĝi estas la unua artista trupo de Novzelando, kiu vizitis Ĉinion post la starigo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Novzelando en 1972. La pli ol 50 novzelandaj amikoj ekvivis en amikeco kaj ĝojo tuj post alveno al Ĉinio.


En la 7-a de septembro, la orkestro alvenis al la ĉina urbo Kantono, kie ĝi faris vizitadon kaj prezentadon en tri tagoj kaj estis varme bonvenigata de kantonaj popolanoj.

En la 10-a, kiam la nomita orkestro atingis Pekinon, sur la aerodromo de Pekino, centoj da geknaboj ĝoje dancis kun bukedoj kaj tamburinoj en la manoj por varme bonvenigi la artajn delegitojn de Oceanio.

De la 10-a ĝis la 15-a ĝi faris prezentadon en Pekino. En la sekvanta tago post sia alveno al Pekino, la novzelandaj amikoj ĝoje venis al la impona Tian-anmen-pordego kaj faris tie multajn fotojn por memoro. Intertempe de siaj streĉaj ekzercado kaj prezentado, la novzelandaj amikoj vizitis la Centran Filharmonion de Ĉinio por interŝanĝi sperton.

La prezentado de la novzelanda orkestro profunde impresis la ĉinajn spektantojn. Tiu orkestro estis fondita en 1959 kun la celo de fondado de profesia filharmonio propra de

*Vicĉefministro Ĝang Ĉunkiaŭ fotiĝis kun muzikistoj post ilia prezentado.*



Novzelando. En la mallonga periodo de dekkelkaj jaroj, la trupo jam havis konsiderinde abundan repertuaron, dank' al zorga kulturado de la maljunaj muzikistoj kaj vasta praktikado.

Inter la verkoj prezentitaj de la novzelanda orkestro troviĝis "Uverturo de Aotearoa" de novzelanda moderna komponisto Douglas Lilburn, klarneta konĉerto de John Ritchie, kaj verkoj de aŭstra klasika komponisto Franz Joseph Haydn kaj finna komponisto Sibelius. Kaj la karakterizaĵoj de tiuj verkoj kun malsamaj stiloj estis atente prezentitaj de la orkestro. La lerta ludado de klarnetosolo de sinjoro Keith Spragg kun helaj tonoj de bone regata forteco rikoltis multajn laŭdojn. Estas videble, ke la orkestro de junaj amatoroj jam atingis ĝojindajn sukcesojn en tekniko, precipe en ekzercado de kunludado. La serioza kaj vigla arta stilo de la muzikistoj forte impresis la spektantojn. La sukcesoj de la junula orkestro estas nedisigeblaj de la rigora sinteno de la direktoro de la orkestro Ashley Heenan rilate al arta kreado kaj trejnado en tekniko kaj lia lerta gvidado laŭmetoda.

La orkestro ludis ankaŭ du ĉinajn muzikopecojn elektitajn el la revoluciaj modernaj baletoj "Blankhara Knabino" kaj "Gefiloj de la Stepo", kiuj estas tre popularaj kaj ŝatataj en Ĉinio. Sinjoro Ashley Heenan, estro de la orkestro, rigardis la filmon de la revolucia moderna baleto "Blankhara Knabino" en la Ĉina Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio okazigita en 1974 en Novzelando. Li forte interesiĝis pri la muziko de la baleto kaj deziris foje persone direkti prezentadon de tiu verko. Ĉifoje alveninte al Ĉinio li kaj la junaj trupanoj tuj komencis provludi fragmenton de tiu verko. Ili venkis multajn malfacilojn kaj dank' al sia klopodado relative bone mastris la stilojn de la du muzikopecoj. Estas ĝojinde ke ĉinaj kaj novzelandaj muzikistoj bone kunlaboris en la prezentado. Tio konkrete montris la amikecon inter la muzikaj laborantoj de la du landoj kaj rikoltis varman aplaŭdadon de la spektantoj. La spektantoj kore ĝojis pro ilia serioza kaj entuziasma ludado kaj varme gratulis la novzelandajn amikojn pro ilia sukcesa prezentado. Sinjoro Ashley Heenan diris, ke en Ĉinio finfine efektiviĝis ilia deziro pri prezentado de fragmentoj de "Blankhara Knabino" kaj "Gefiloj de la Stepo", kaj ke ili povis ludi tiel belajn muzikopecojn nur post kono de la pensoj kaj sentoj de la ĉina popolo post alveno al Ĉinio.

La Nacia Junula Orkestro de Novzelando ne nur alportis al nia popolo sian ĉarman muzikon per ĉifoja vizito kaj prezentado en Ĉinio, sed ankaŭ amikajn sentojn de la novzelanda popolo al la ĉina popolo kaj profundigis la interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj kaj artaj laborantoj de Ĉinio kaj Novzelando.




# La baŭ-an-oj

de ZONG MIN

KIEL unu el la ĉinaj naciecoj relative malmultnombraj la baŭ-an-a nacieco nombras nur pli ol 6,500, kies plejparto loĝas en Dahegia, kaj la ceteraj dise en aliaj lokoj de Linhia, Gansu-provinco.

La baŭ-an-oj havas sian propran parolan lingvon, kiu apartenas al la mongola lingvofamilio de la altaja lingvosistemo. Tiu lingvo havas certan rilaton kun la mongola kaj tahura kaj estas iom simila al la tu-a kaj dungŝjang-a. Multaj ĉiutage uzataj vortoj de tiuj lingvoj estas komunaj. Ĉar la baŭ-an-oj havas longajn intimajn rilatojn kun la han-oj kaj huj-oj, ilia lingvo alprenis al si multajn hanlingvajn vortojn, kiuj konsistigas 40 pocentojn de la baŭ-an-aj ĉiutage uzataj vortoj kaj fariĝis grava parto de la baŭ-an-a vortaro. Ankaŭ en fonetiko kaj gramatiko la baŭ-an-a lingvo ricevis certan influon de la hana lingvo.

La baŭ-an-oj tamen ne havas sian propran skriban lingvon kaj uzadas la hanan lingvon kiel socian komunikilon. Nun ĉiuj baŭ-an-oj scipovas paroli kaj skribi en la hana lingvo.

En la dinastioj Ming kaj King (1368 — 1911 p. K.), nombro da popolanoj kaj soldatoj estis senditaj de la nuna Linhia kaj aliaj lokoj al Kinghaj por ekspluati tie virgan teron. En la jaro 1729 p. K. en la vilaĝo Baŭ-an de Tongjen-gubernio de Kinghaj jam loĝis pli ol cent familioj, kiuj plus tiuj de aliaj kvar najbaraj vilaĝoj sume nombriĝis ĉ. mil. Tiuj popolanoj el diversaj regionoj kaj naciecoj kune vivis kaj laboris kaj interkontaktiĝis amike tiel ke ili asimiliĝe kunfandiĝis en novan naciecon, kiu alprenis al si la nomon de la loko baŭ-an. Dum la periodo de 1851 ĝis 1860, servutula mastro kaj grandlamao de Longvu-templo de tiu loko Hiaĵilun devige konvertis al lamaismo la baŭ-an-ojn, kiuj estis islamanoj, kaj senĉese instigis tu-ojn al konflikto kun baŭ-an-oj, por pligrandigi siajn bienojn kaj forrabi iliajn riĉaĵojn. Tial la baŭ-an-oj komencis translokiĝi kaj fine fiksloĝiĝis en Dahegia de Linhia.

Dahegia situas okcidente de la urbo Linhia kun Giŝi-monto en la okcidento kaj la Flava Rivero en la nordo. Tiu distrikto, je ĉ. 25 kilometroj longa de sude al norde kaj je ĉ. 20 kilometroj larĝa de oriente al okcidente, estas loko riĉa je densaj arbaroj, verdaj herbejoj kaj akvofonto, kaj taŭga por agrikulturo kaj brutobredado.

La baŭ-an-oj okupiĝas ĉefe pri agrikulturo. Iliaj ĉefaj plantaĵoj estas tritiko, sekalo, fazeoloj, poligono, terpomo, maizo kaj sukerbeto. Dahegia abundas ankaŭ je fruktoj kiel ekzemple la du specoj de piroj, unu konservebla tra vintro kaj la alia tre delikata, kaj juglandoj kun maldika ŝelo.

Antaŭ la Liberiĝo la baŭ-an-oj vivis tre mizere. La lokaj baŭ-an-aj kaj huj-aj regantoj, bienuloj kaj religiaj aŭtoritatuloj okupis grandegan areon da agroj, arbaroj kaj fruktoĝardenoj, kaj monopolis la irigaciajn rimedojn, tiel ke la malriĉaj baŭ-an-aj kamparanoj devis labori kiel iliaj farmistoj, kiuj devis

pagi ne nur pezan rentumon sed ankaŭ senpage labori por ili almenaŭ tri monatojn en ĉiu jaro. La reakcia reganta klaso ankaŭ, utiligante religian disciplinon, subpremis la popolanojn kaj laŭvole turmentis kaj mortigis samreligiulojn per siaj karceroj kaj torturiloj. Eĉ 20-30% de la totala enspezo de la kamparanoj estis forrabitaj de la feŭdaj religiuloj. Pro la barbara feŭda ekspluatado, perforta rekrutigo kaj pagigo de multaj impostoj fare de la reakcia registaro de Kuomintango kaj lokaj militaristoj, la agrikulturo en la distrikto de la baŭ-an-oj estis tre postiĝinta kaj la mua (1 muo = 1/15 hektaro) produktokvanto estis malpli ol 50 kg., kaj pro manko de vivrimedoj tieaj loĝantoj ofte formigris kun siaj familianoj.

Kie estas subpremo, tie estas kontraŭstaro. En la lastaj cent jaroj, la baŭ-an-aj popolanoj plurfoje batalis kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo kune kun lokaj huj-aj kaj han-aj popolanoj kaj donis certan baton al la reakcia reganta klaso.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la baŭ-an-a popolo, kiu estis malestimata, subpremata kaj neniam rekonata kiel unu nacieco en la malnova socio, fariĝis, en la brilo de la nacieca politiko de la Partio, unu el la membroj de la granda multnacieca familio de nia lando kaj ekĝuis la rajton de nacia egaleco. La demokratia kaj socialisma reformoj alportis profundan ŝanĝon al la baŭ-an-a distrikto. La baŭ-an-a popolo rezolute iras la socialisman vojon. En la alta tajdo de la granda antaŭensalto en 1958 ĝi kune kun huj-oj kaj sala-oj likvidis kaj abolis la religiajn feŭdajn privilegiojn kaj la subpreman kaj ekspluatan sistemon, kaj rompis la spiritan katenon kiu longe ligis la popolon. Dank' al la hardado de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la baŭ-an-oj pliapaŝe altigis sian konscion de la batalo inter la du klasoj kaj la du linioj. Senĉese kreskas baŭ-an-aj kadroj. Multaj eminentaj baŭ-an-aj gefiloj glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Komunisma Junulara Ligo kaj donas bonajn ekzemplojn en plenumado de la politikoj de la Partio kaj la socialisma konstruado.

Post la Liberiĝo, ilia agrikulturo ricevis rapidan disvolviĝon. La revolucio liberigis la produktan forton. En la dua jaro post la komunumigo en 1958, la mua produktokvanto de tritiko de pli ol 2,000 muoj atingis 260 kg. aŭ 300 kg. En disvolvo de industrio, oni starigis fabrikojn de lignaĵoj, kemia sterko, insekticidoj, faruno kaj olepremado. Precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, por radikale solvi la problemon de sekeco la baŭ-an-a popolo fosis irigaciajn kanalojn kaj faris aliajn akvoutiligajn konstruojn, kio grandigis la areon de irigaciataj kampoj kaj garantiis riĉajn rikoltojn ĉu en jaro de tro multe aŭ tro malmulte da pluvoj. Anminvan de Liugi-komunumo koncentre loĝata de baŭ-an-oj estis fame konata antaŭ la Liberiĝo kiel "vilaĝo de rifuĝintoj" kaj longe suferadis de trosekeco kaj tre malprosperis. La vilaĝanoj tiam havis nur kelkajn kadukajn kaverndomojn kaj dekojn da muoj da malfekundaj montkampoj kaj ili devis aŭ iri aliloken por perlabori vivrimedojn aŭ almozpeti. Nun irigacia kanalo serpentumanta sur montoj kondukas akvon al montodeklivoj kie kampoj estas konstruitaj kaj arbaroj plantitaj, kaj la vilaĝo jam fariĝis loko, kie oni abunde produktas fruktojn kaj akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj.

Sub la zorgado de la Partio, la kultura, eduka kaj higiena aferoj de la baŭ-an-a distrikto ricevis rapidan disvolvon. Antaŭ la Liberiĝo tie estis nur unu kaduka elementa lernejo kun tridek kelkaj lernantoj, nun tie funkcias elementaj kaj mezaj lernejoj, kultura stacio, klubo, kinejo kaj biblioteko kaj nemalmultaj baŭ-an-aj junuloj studas en la Nordokcidenta kaj la Centra Institutoj por Nacimalplimultoj. La nigra febro kiu minacis la sanon de la baŭ-an-oj jam estas fundamente ekstermita kaj hospitalo, kuracejoj, sanitarejoj kaj nudpiedaj kuracistoj diligente servas al la popolo. Nun en lokoj de la baŭ-an-oj ĉie regas prospero.




## NOVA STELO RIMARKITA DE LA PEKINA OBSERVATORIO

45 minutojn post la 22-a horo de la 30-a de aŭgusto la Pekina Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj rimarkis novan stelon en la konstelacio de Cigno. La situo de la nova stelo estas: 10 minutoj de la 21-a horo de la rekta ascensio, 48 gradoj plus sesdekono de la norda latitudo de la deklinacio. Ĝia vida brileco estas duaklasa. Observado per fotado montris, ke ĝia spektro prezentas larĝan kaj fortan radiadon. Ĝi estas la plej brila nova stelo post la erupcio de la nova stelo de la konstelacio de Poŭpo.

Ĉi novan stelon rimarkis ankaŭ Duan Juanhing, intelekta junulo sin hardanta en la komunumo Ĝuzuo de la gubernio Ningdu de la provinco Gianghi, kiu deinfanece interesiĝas pri astronomio, en 35 minutoj de la 19-a horo de la 30-a de aŭgusto, laŭ pekina tempo.

Nova stelo estas astro abrupte pliheliĝanta en mallonga tempo, kaj efektive estas fenomeno de granda erupcio de astro. Observado pri erupcio de nova stelo havas gravan signifon por koni la evoluon de astroj.

## EKSPOZICIO DE SPORTAJ FOTOJ EN PEKINO

La ekspozicio okazis de la 1-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro en la Ĉina Belarta Ekspoziciejo.

La ekspozicio prezentis pli ol 230 fotojn spegulantajn la sportan aktivadon de la ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj plene utiligis siajn utiligeblajn kondiĉojn observante la principon disvolvi postlaborajn sportojn kun ŝparemo. Troviĝis ankaŭ fotoj pri sporta aktivado de nacimalplimultoj. El diversaj flankoj, la fotoj vivece spegulis la solidarecon de sportistoj de diversaj naciecoj de nia lando kaj multajn novajn aferojn, ekz. laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj komentariis pri la sportaj maĉoj, sportistoj iris en la kamparon kaj fabrikojn por tie fari maĉojn, k.s.

La eksponitaj fotoj estas elektitaj el 3,000 fotoj senditaj de diversaj lokoj de la tuta lando kaj la 80 pocentoj de la fotoj estis faritaj de laboristaj, kamparanaj, soldataj kaj aliaj amatoroj.

## ELDONO DE ALBUMO "HINGIANG"

Por celebri la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de nia lando, oni eldonis grandformatan albumon "Hingiang".

La albumo konsistas el 150 fotoj faritaj de diversnaciecaj fotistoj kaj sur la unuaj paĝoj estas portreto de Prezidanto Maŭ kaj fotoj pri kunesto de Prezidanto Maŭ kaj kadroj kaj amasoj de diversaj naciecoj de Hingiang.

La albumo akcente spegulas la grandajn sukcesojn de diversnaciecaj popolanoj de Hingiang harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio, akiritajn en la socialisma revolucio kaj konstruado, precipe en la batalo por oponi kontraŭ reviziismo kaj defendi la patrolandon, sub la gvido de la Centra Komitato de la Kompartio estrata de Prezidanto Maŭ. Plimulto de la fotoj spegulas nacimalplimultajn laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn heroojn kaj socialismajn novajn aferojn aperintajn sur la diversaj frontoj, priskribas kunan konstruadon de ŝtala muro fare de la diversnacieca popolo de Hingiang kaj komandantoj kaj soldatoj de ĈPLA. Kaj la ceteraj fotoj prezentas belajn vidaĵojn sude kaj norde de Tianŝan-montaro en Hingiang.




### SUKCESA ELFARO DE SINTEZA-NATURA KAŬĈUKO

En kompakta kunlaboro, la Instituto de Praktika Kemio de Gilin de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Instituto de la Gilin-a Kemiindustria Kompanio sukcesis elfari rarateran poliesoprenan kaŭĉukon.

Poliesoprena kaŭĉuko estas tre grava speco de sinteza kaŭĉuko. Ĝiaj molekula strukturo kaj kvalito estas tre proksimaj al tiuj de natura kaŭĉuko kaj estas unika surogato de natura kaŭĉuko nun en nia lando, tial oni nomas ĝin ankaŭ "sinteza-natura kaŭĉuko". Ĝi estas taŭga por fabrikado de pneŭmatiko kaj aliaj objektoj kaj estas vaste uzata en la nacia ekonomio kaj nacidefenda industrio.

### MALFERMO DE AERLINIO DE LANĜOŬ ĜIS LASAO

Oficiale malfermiĝis al trafiko la aerlinio de Lanĝoŭ ĝis Lasao. La nova linio firme interligas Pekinon, Lanĝoŭ kaj Lasaon.

Tiu ĉi linio estas la dua aerlinio de nia landinterno al Lasao. La unua linio de Ĉengdu al Lasao estas malfermita en 1965. La linio longas 1,636 kilometrojn, komenciĝas de Ĝongĉuan-aerodromo de Lanĝoŭ, transflugas la urbon Hining, la lagon Kinghaj, la basenon Cajdam kaj la subprovincon Golmud, traflugas montpasejon de Kunlun, poste Tanglanmontaron altan je 6,750 metroj, kaj fine atingas la aerodromon de Lasao. Ĝi estas la plej malfacila el la aerlinioj de Ĉinio. La aviadiloj faras ir-reiran flugon en sama tago kaj ĉiusemajne flugas du fojojn. La malfermo de la aerlinio multe mallongigis la vojaĝon inter Lanĝoŭ kaj Lasao.

## Sur la vojo al la hejmo post lernohoro

de Hiaŭ Ming



*Sur la kovrilo:*

Knabinetoj en parko dum la Nacia Festo




# EL POPOLA ĈINIO 中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**
**P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 12 (209) 1975**


## Ĉefa Enhavo


La grandioza Longa Marŝo . . . . . . . . . . 1

Grandioza sportkunveno de unuiĝo kaj venko . . . 4

Ĉie estas karuloj en la patrolando . . . . . . . . 10

Nova generacio de gimnastoj . . . . . . . . . 13

Nova moro en konkursejo . . . . . . . . . . 16

Hingiang antaŭen marŝas en la batalo kontraŭ reviziismo . . . . . . . . . . . . . . . . . 18

La nova laboristaro de Tibeto . . . . . . . . . 22

24-jara kampara vivo . . . . . . . . . . . 27

Bredejo de buntafelaj semŝafoj . . . . . . . . . 30

Novtipa laborista universitato en progreso . . . . . 33

Nova floro de kombiniĝo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj . . . . . . . . . . . . . . . . 37


Junulino Ĉen Ĉuanhiang batmortigis leopardon . . . 41

Kial la koko ne kokerikas plu? . . . . . . . . . 43


Liberigo de ĉiuj enkarcerigitaj usonaj-ĉiangkajŝekaj armitaj spionoj . . . . . . . . . . . . . . 44

La baŭ-an-oj . . . . . . . . . . . . . . . 48

# La amasaj sportaj aktivadoj en Ĉinio



Laborantoj de fabriko faras gimnastikan ekzercon



Konkurso sur glacio





Laborantoj de meteostacio persistas pri sporta ekzercado.


Sporta aktivado de ŝoseaj laboristoj de la linio Siĉuan-Tibeto



Korbopilka konkurso en hejmloko de ĉinaj el-
migrintoj, Fuking-gubernio de Fugian-provinco.








Ĉevalrajda konkurso estas ŝatata tradicia sporto de la tibetanaj paŝtistoj.

Pilkludo ĉe marbordo







Akvopilko

ĉo de poloo.




Sur pilkluda placo de lernejo



# La Dugiang-a Irigacia Sistemo hodiaŭ




Birdrigardo al la ebenajo de okcidenta Siĉuan



Baŭpingkoŭ estas parto de la sistemo



Elfluejo de akvotunelo



Akvorezervejo




Akvedukto

La Dugiang-a Irigacia Sistemo troviĝas en la okcidenta parto de la Siĉuan-a Baseno de nia lando. Tiun grandan akvoutiligan sistemon konstruis laborantaj popolanoj de nia lando antaŭ pli ol du mil jaroj.

Post la Liberiĝo, la popolanoj en la areo de tiu irigacia sistemo riparis ĝin en mallonga tempo, sub la zorgo de la Partio kaj la registaro, kaj ebligis irigaciadon al 200.000 hektaroj da fekundaj kampoj. En vintro de 1970, la lokaj amasoj reformis lige kun fundamenta konstruado de agroj la pli ol 60.000 malnovajn kanalojn en la tuta irigacia regiono en pli ol 30.000 modernajn kanalojn, en kiuj akvo povas flui rapide kaj kiuj estas uzeblaj tiel por drenado kiel por irigaciado. Pli ol 5.000 kilometroj da novaj ĉefaj kaj branĉaj kanaletoj kaj pli ol 400 grandaj kaj malgrandaj akvoreguligaj kluzoj estas konstruitaj, tiel ke pliaj 280.000 hektaroj da kampoj fariĝis irigacieblaj kaj la tuta Ĉengdu-a Ebenajo okcidente de Longkjuan-monto irigaciebla per memflua akvo. Nun la ĉefaj konstruajoj de la nova irigacia regiono jam estas kompletigitaj unu post alia kaj je la fino de la jaro 1974 la irigaciata areo jam plivastiĝis je 547.000 hektaroj.

Sekve de la disvolviĝo de la akvoutiliga konstruado, riĉaj agrikulturaj rikoltoj estas akiritaj en sinsekvaj jaroj. Krome, la sistemo ankaŭ provizas akvon al industrio kaj elektrono al popolaj komunumoj kaj alportas pli kaj pli grandajn utilojn.

*Sur la dorskovrilo:* La ĉefaj kanaloj de la Dugiang-a Irigacia Sistemo.



# Indekso de EPĈ, 1975

## Politiko


| | N-ro | p. |
|---|---|---|
| Liuhia Ĝi refutis Konfucion | 1. | 39 |
| Nova fizionomio de Hiaŭginĝuang | 2. | 1 |
| Studo de filozofio en Kingian-brigado | 2. | 8 |
| La kadroj de la nova Ĉinio estas ordinaraj laboruloj | 2. | 20 |
| La progresema historia rolo de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio | 2. | 37 |
| Laborista teoria trupo | 3. | 23 |
| Komuniko de la Dua Plena Sesio de la Deka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (speciala suplemento) | 3. | |
| Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko (speciala suplemento) | 3. | |
| Venke marŝu antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ | 4. | 1 |
| Forpasis kamarado Dong Bivu | 6. | 1 |
| Funebra parolado de Vicprezidanto Je Gianjing | 6. | 3 |
| Eterne vivu en nia memoro la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kamarado Dong Bivu! | 6. | 6 |
| Vojo de virina liberigo de Ĉinio | 6. | 11 |
| Virinoj sur gvidaj postenoj | | |
| — Pri aktivadoj de kadrinoj de Linhi-gubernio | 6. | 17 |
| Ĉinio liberigis militajn krimulojn per speciala amnestio | 7. | 26 |
| Notoj pri la kunvenoj por liberigi militajn krimulojn per speciala amnestio | 7. | 30 |
| Ĝoja renkontiĝo de la liberigitoj sub speciala amnestio kun siaj familianoj | 7. | 33 |
| ĈPLA-anoj amas la popolon | 8. | 4 |
| Marŝas la nova socialisma Tibeto | 11. | 1 |
| Antaŭen marŝu, Lasao! | 11. | 5 |
| Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio | 11. | 8 |
| Popoloj de Hingiang, mastroj de la ŝtato | 11. | 14 |
| La grandioza Longa Marŝo | 12. | 1 |
| Hingiang antaŭen marŝas en la batalo kontraŭ reviziismo | 12. | 18 |
| La nova laboristaro de Tibeto | 12. | 22 |
| Kial la koko ne kokerikas plu? | 12. | 22 |
| Liberigo de ĉiuj enkarcerigitaj usonaj-ĉiangkajŝekaj armitaj spionoj | 12. | 44 |


## Industrio, trafiko


| | | |
|---|---|---|
| Brila perlo sur la Flava Rivero | 1. | 21 |
| Venka navigacio | 2. | 23 |
| Fabriko malgranda, antaŭenpaŝo granda | 3. | 18 |
| Raporto pri la Nankina Pontego super Jangzi-rivero | 3. | 27 |
| Ĉinaj laboristoj estas mastroj de la entrepreno | 5. | 1 |

La unua oleodukto de Ĉinio 5. 12
Iri la vojon de sinapogo sur propraj fortoj 7. 3
La ŝanhaja haveno en antaŭenmarŝo 7. 8
Nova vojo de produktado de trikitaj lanvestoj 7. 13
Ĉangĝoŭ-a industrio en rapida disvolviĝo 8. 10
Sur la Siĉuan-Tibeta Ŝoseo 8. 19
Elektrizado de la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo 10. 19
Malgrandaj akvoturbinoj 11. 38


## Agrikulturo, forstokulturo, fiŝado bestobredado k. a.


Grena memsufiĉo de Hebej, Ŝandong kaj Henan 1. 12
Arbara Regiono de Granda Hing-an-montaro en konstruado 1. 24
Fiŝista vilaĝo ĉe marbordo 2. 13
Ĝojiga afero el la Tibeta Altebenaĵo 3. 15
Prospera disvolviĝo de agrikultura mekanikigo en la nova Ĉinio 4. 7
Nova paĝo pri sinapogo sur la propraj fortoj
— Pri disvolviĝo de agrikultura mekanikigo en Jantaj-subprovinco 4. 14
Agrikultura mekanikigo de Ĝŭang-a montregiono 4. 19
Kreintoj de miraklo 5. 18
Malfermo de feliĉa fonto por dekmilo da generacioj 6. 29
En daŭrigo de la revolucio
— Notoj pri avangardaj aktivadoj de la kadroj de Hipu-brigado 7. 15
Novaj "Malsaĝaj Avoj" en Tajhang 8. 15
Riĉa rikolto de someraj grenoj en Ĉinio 10. 16
Prospera Kunes-stepo 11. 21
Niutoŭ, vilaĝo de herooj 11. 26
Bredejo de buntafelaj semŝafoj 12. 30


## Financo kaj komerco


Ne estas inflacio en nova Ĉinio 1. 1
Impostoj en Ĉinio 1. 6
Okulfrapa kontrasto 1. 20
Ne por ĉasi profiton 6. 34
Kampara aĉeta kaj disvenda kooperativo 10. 23


## Kulturo, eduko kaj scienco


Kulturi teknikistojn per la propraj fortoj 2. 26
Eduka revolucio en Pekina Universitato 3. 1
La eduka revolucio por mi 3. 9
Post reveno al laborposteno 3. 12
Bredi serpentkapajn fiŝojn 4. 24
Meteologiaj studoj sur altebenaĵo 6. 36
Nova atingo en scienca esplorado pri tropikaj plantoj 6. 47
Novaj arkeologiaj trovoj 8. 48
Pri funkciado de lernejo kun malfermita pordo 9. 1
Eksterlerneja edukado al geknaboj 9. 5
Vizito al regiono plagita de tertremo 9. 13
Kultivado de bonaj specioj 9. 27
Batalo kontraŭ hajlo por riĉa rikolto 11. 35
Novtipa laborista universitato en progreso 12. 33


## Literaturo kaj arto


El versaĵoj de komunumanoj de Hiaŭginĝuang 2. 7
Artaj ludoj de infanoj 2. 29
Pri la infana filmo "Trembrilanta Ruĝa Stelo" 4. 27

Kiel mi ludis la rolon de Dongzi 4. 31
Mia kuzo Erjong (infana literaturajo) 4. 33
La mano de l' sekretario de partia komitato (poemo) 6. 39
Novajn kantojn el Ĉangbaj-montaro
— Pri juna kore-nacieca komponisto Kim Ponghaŭ 7. 23
Kuna defendo de landlimo (poemo) 8. 8
Navigado al la for' (kanto) 8. 37
Infanoj verkas novajn infankantojn 9. 9
Porkbreda avino (kantrakonto de Pudong*) 9. 44
Reformo de ĉinaj lokaj operoj 10. 1
Servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj dum la tuta vivo 10. 6
"Teatra trupo kun portvektoj" 10. 10
Ho, samsangaj fratoj niaj en Tajvan (kanto) 11. 52
Kiel ni verkis la kanton "Ho, samsangaj fratoj niaj en Tajvan" 11. 54
La Longa Marŝo (poemo) 12.

## Higieno kaj sporto

Nova brilo de anestezo per ĉinaj tradiciaj drogoj 1. 27
Reviviĝo de la du interrompitaj brakoj 4. 36
Laboristaj produktaj gimnastikoj 5. 34
Sanprotekto al virinoj kaj infanoj en nova Ĉinio 6. 25
Ĉinaj montgrimpistoj refoje konkeris Ĝomolangman 8. 23
Ĝomolangma (materialo) 8. 28
Pri la kuracaj pagoj de Ĉinio 9. 33
Novaj rimedoj por kuraci brulvundon 10. 29
Kvin jaroj en kamparo 11. 42
Grandioza sportkunveno de unuiĝo kaj venko 12. 4
Ĉie estas karuloj en la patrolando 12. 10
Nova generacio de gimnastoj 12. 13
Nova moro en konkursejo 12. 16
Nova floro de kombiniĝo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj 12. 37

## Avangarduloj

Heroaĵo de tibetana komunisto Bude 2. 16
Kontistino en montvilaĝo 3. 29
Nia "maljuna ŝipestro" 4. 22
Li efektivigis sian deklaron 5. 23
Sekretariino Vang Jalan 5. 27
Nova revolucia generacio
— Notoj pri faroj de kompartianino Vang Aĵĝen 7. 19
Li kondutas ankoraŭ kiel ordinara soldato 8. 1
Li konservas la naturon de ordinara laborulo 8. 40
Por la nobla idealo 9. 21
Senhalte sur la revolucia vojo 10. 33
24-jara kampara vivo 12. 27
Junulino Ĉen Ĉuanhiang batmortigis leopardon 12. 41

## Popola vivo

Solvo de senlaboreco en nova Ĉinio 1. 8
Familio de ordinara laboristo 1. 17
Bejhinkiaŭ-loĝkvartalo 5. 31
Granda rolo ludata de virinoj en nia konstruado 6. 22
Moviĝanta seĝo por tekstilaj laboristinoj 8. 43
Vizito al tri cent-jaraj gemaljunuloj 8. 45
Serĉado de parencoj 9. 31
Serĉi perdintojn 10. 37
Vizito al blindula fabriko 11. 49

## Ĉinaj naciecoj


Lisu-nacio 1. 36

Maŭnan-nacio 2. 35

Ŝuj-nacio 3. 40

Ĥalĥazoj 4. 42

Ovenke-nacio 5. 41

Ĝingpo-nacio 6. 49

La dahuroj 7. 36

Golaŭ-oj 8. 52

La molaŭ-oj 9. 42

La dungŝjang-oj 10. 41

La benglung-oj 11. 56

La baŭ-an-oj 12. 48


## Internaciaj rilatoj


Vjetnamaj esperantistoj en Ĉinio 1. 30

Navigado disvastiganta amikecon 2. 31

Unu memorinda pentraĵo

— Pri la vizito kaj prezento en Alĝerio 3. 32

Floro de bataleca arto

— Pri la Liberiga Arta Trupo de Sudvjetnama Respbuliko en Ĉinio 3. 35

Amikeco neforgesebla

— Notoj pri prezentada vojaĝo de la Centra Filharmonia Trupo en Japanio 4. 38

Amikeco ĉe la ŝero Langhuagiaŭ 5. 36

Amikeco sub la senombra lampo

— Pri la Ĉina Studa Grupo de Korkirurgio en Argentino 6. 41

Ni restos ĉiam kune 7. 1

Vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping al Francio 8. 29

Oficialaj rilatoj starigitaj inter Ĉinio kaj EEK 8. 34

Rumana Industria Ekspozicio en Pekino 8. 34

Bonvenigon al Infana Ĥoro Rosny 8. 35

Reviviĝis la rompita kruro de Branko 9. 38

Dana esperantistino en Pekino 9. 41

Novzelanda esperantistino en Ĉinio 10. 32

Vjetnama elefanto en Pekino 10. 39

Ekspozicio de pentraĵoj 10. 40

La popoloj interligiĝas koro ĉe koro 10. 40

Kunveno de solidareco kaj amikeco

— Pri la Internacia Amikeca Invita Kunveno de Naĝado kaj Plonĝado 11. 31

Intima interparolado sur Songhua-rivero 11. 45

Gastoj el malproksima lando 11. 48

Teknika ekspozicio de FRG en Pekino 12. 45

Ekspozicio de Aŭstraliaj Pejzaĝaj Pentraĵoj 12. 45

La Nacia Junula Orkestro de Novzelando en Pekino 12. 46


## Internaciaj eventoj


Maligna inflacio 1. 33

Denove sonoris la sonorilo sur la varsovia kastelo 2. 33

Voĉoj de la laborantaj popoloj en la kapitalismaj landoj 5. 38

La tria mondo disvolviĝas kaj fortiĝas en batalado 6. 52

Heroaj gefiloj de Angkor 9. 35